



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Januaro 2018 n-ro: 25



*Merhaba,*

Üçüncü yılımızın ilk sayısı ile gene sizlerle birlikteyiz.

Bu sayımızda da birbirinden ilginç yazılar var. Ama ne yazık ki hep yabancı esperantistler katkıda bulunuyorlar dergiye. Halbuki Türk esperantistlerin kısa da olsa öyküler yazması ya da çevirmesi ne kadar güzel olurdu.

Dikkatinizi sayfa 2'de henüz bir kaç hafta Esperanto dersi almış bir hanımın yazdığı hikayeye çekmek istiyorum.

*Hepinize iyi okumalar !*

*Saluton,*


Ni denove estas kun vi per nia unua numero de la tria jaro.

Ankaŭ en ĉi tiu numero estas multaj interesaj artikoloj por vi. Tamen ni malĝojas pro la fakto ke preskaŭ nur fremdaj esperantistoj kontribuas al nia revueto. Ni tiom ŝatus se turkaj esperantistoj kontribuas per mallongaj rakontetoj aŭ tradukajoj.

Ni volas atlini vian atenton al la rakonteton en la dua paĝo, kiun verkis komencantino post kelkaj tagoj de Esperanto kurso.

*Bonan legadon al ĉiuj !*

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Ŝahmerano	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Novjara Bondeziro de Angel Maglov	4
Mortodatreveno de Claude Piron	5
Amo	5
Aranefobio	6
Kiel mi lernis Esperanton	6
La du plej famaj bengalaj poetoj	7
Profunda, longa bedaŭro	8
De kie devenas la nomoj de valutoj?	9
Dialogo inter Luiza CAROL kaj Mirejo GROSJEAN (parto 1)	10
Kun Esperanto-sumoo ĉirkaŭ la mondo EROSO kaj PSIĤA (ΕΡΩΣ και ΨΥΧΗ)	12
La instruisto	14
Via nomo flugas en la aero	14
UEA-interveno ĉe UN en Ĝenevo	17
Ŝercoj	17
Kurcvortenigmo	18
Reprezentanto de Turkio por UMEA	18
Mallonga Historio de Filozofio (23)	19
El la libro de "Dao de Jing" (17)	20
Esperanto-Kulturdomo Gresillon	20
Dankon Amiko (12)	21
Vintra Vento (poemo)	21
Interstela gasto	22
Centjara Naskiĝfestoj de Marcel Leereveld	23
Kongresa Komunikado 1	24
Lingvo Kreita de Virinoj por Virinoj	25
Monda Monunujo: La Stelo	26
Esperanto Kurso (23)	30
Komuna Legado okaze de Libro Tago	31
Veganarto	32
Int.Esp.Lit.Konkurso "Hristo Gorov – Hrima"	32

## Kursoj



- 1) Okazas du kursoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul sed la nombro de gelernantoj malmultiĝis: (a) La unuan kurson gvidas Nicholas Sarmiento kaj instruas nuntempe al nur 1 instruisto. (b) La duan kurson gvidas Murat Özdizdar, kaj nuntempe instruas al 3 gelernantoj kaj 2 instruistoj. Ambaŭ kursoj daŭros dum la tuta lerneja jaro.
- 2) La pagata kurso por Esperanto interesiĝantoj en Kadıköy distrikto en ÖBD Sciencfikcia Biblioteko (vidu Turka Stelo #21 p.22) en kiu estis 11 lernantoj nun estas haltigita.
- 3) Nova kurso por Esperanto interesiĝantoj komencis en Çirak Atölye en Çağaloğlu distrikto en la Eŭropa parto de Istanbul kaj nun estas 12 lernantoj en ĝi. La kurson gvidas Vasil Kadifeli.
- 4) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

**Jen rakonteto verkita de komencantino post 4 kurso-tagoj de Esperanto lernado en la dua kurso:**

### Ŝahmerano

#### Ŝahmerano, memoraĵo el Istanbul

Kiam mi estis infano, estis foiro kun tendoj en la parko Gülhane. En unu granda tendo estis spektaklo kiun ni ĉiuj amis: "**Serpento-Knabino**

#### Ŝahmerano".

Ŝahmerano estis duono serpento kaj duono knabino, kiel marvirineto! Oni anoncis ke ŝi troviĝis en Amazono Arbaro.

Kelkfoje la tendo estis fermata kaj la viro antaŭ la pordo de la tendo, rigardante sian horloĝon en grava maniero, diris, "Serpento Knabino, ŝi nun trinkas sian lakton! Post tio ŝi dormos dum du horoj." Tiam ni estis malfeliĉaj kaj senpaciencaj,



verkis **Nur Bilimer Arıklı**

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



La 49-a Intenacia Esperanto-Sumoo okazis inter la 12-a kaj 26-a de novembro 2017 kun partopreno de 299

homoj el 32 landoj.


Kelkaj legantoj ne sendis kompletan rezulton. La rezulto estas grava kiam ni faras la venontan liston, do nepre sendu ĝin.

La 50-a jubilea Sumoo okazos inter la 14-a kaj 28-a de januaro 2018. Ni volas celi 400 partoprenantojn, do ni atendas vian kunlaboron.

Pri la 49-a Sumoo::

1. Bedaŭrinde la nombro de partoprenantoj ne atingis 300 el 32 landoj.
2. Neniu partoprenis el Oceanio. La 49-a Sumoo ne estis tutkontinenta.
3. Svisaj gelernantoj partoprenis. Ni dankas al Monika, ilia instruistino.
4. Nove partoprenis du legantoj el Kubo, sed male iuj landoj malaperis.
5. Por tiu ĉi sumoo laboris Renato (Serbio), Elinjo (Francio), Siva Naga (Barato), Ha (Vjetnamio), Arase (Japanio), Jasuo (Japanio), Vasil (Turkio), Pradip (Nepalo), Irina (Rusio), Anjo (Hungario), Rafaelo (Brazilo) kaj Jitka (Italio). Krome Nema (Koreio) prizorgis koreajn partoprenantojn, Monika (Svisujo) prizorgis siajn gelernantojn, kaj Monsano (Japanio) kaj s-ro Kitagaŭa prizorgis sian japanan grupon. Prizorgas nian retejon kaj diplomon Krystyna (Pollando).

## UEA



N-ro 719 (2017-12-13)  
**Diru vian opinion pri la Malferma Tago**  
Universala

Esperanto-Asocio ŝatus koni la opiniojn de la ĉeestaj kaj virtualaj partoprenintoj de la Malferma Tago en la Centra Oficejo kaj de la Seminario pri Informado, kiu okazis la 25-an kaj 26-an de novembro 2017. Ĉe

<https://www.facebook.com/pg/Universala.Esperanto.Asocio/videos>

eblas spekti kelkajn prelegojn, kiujn UEA dissendis vive dum la evento.

Kiel vi taksas la prelegojn kaj kiujn plibonigojn vi atendas por la venonta evento en aprilo 2018?

Bonvolu respondi per nia formularo

<https://goo.gl/forms/GBUDNJqFrO59QMvB2>

ĝis la 22-a de decembro 2017, post kiu dato ni analizos la rezultojn kaj planos la sekvajn Malferman Tagon kaj Seminarion pri Informado la 28-an kaj 29-an de aprilo 2018 laŭe. [...]



## TEJO



**Olga Sevcenco, la nova volontulino de TEJO**

Ekkonu la novan volontulinon de TEJO Olga Sevcenco! El kiu lando vi estas? Moldavio. Kion vi faras en via eksterEsperantuja vivo, rilate al studoj kaj laboro? Mi havas 2 magistrajn gradojn: unu pri Banka Administrado kaj alia pri Komerca Leĝo. Mi estas iama Kunordiganto pri Evoluado kaj Monitorado ĉe la Nacia Junulara Konsilio de Moldavio. [...]

**Juliana Evandro, nova komisiito pri Landa Agado en Ameriko**

Kun granda ĝojo ni povas anonci ke ni havas novan komisiiton pri Landa Agado en Ameriko: Juliana Evandro! Juliana lernis Esperanton en la jaro 2010 en la Kulturdomo de Esperanto de la Federacia Universitato de Cearao. Jam je la sekva jaro, ŝi ekinstruis la lingvon al studentoj pri inĝenierio de la sama universitato. Ŝi engaĝiĝis [...]

**Serĉata redaktoro de Movada Rubriko**

Ĉu vi volas proksimigi la movadon al la esperantistoj kaj okazigi pripensigajn diskutojn? Ni serĉas redaktoron de Movada Rubriko, informilo trovebla ene de la revuo Kontakto de TEJO, unu el la plej popularaj kaj legata en 90 landoj, distribuata papere kaj bite. Kiel vi laboros Via funkcio estos kontakti junajn esperantistojn por kuraĝigi ilin paroli [...]



## Leterojn ni ricevis el geamikoj



Mirinde, kiel vi sukcesis daŭre krei tiun diversec-riĉan revuon kaj trovas ĉiam artikol-vertantojn. Aliaj homoj (Balkana Stelo) provis sed ne ricevis tiom da

materialo.

Ĉu eblas iel anonci la programon de la Esperanto-kastelo Greziljono. Ĉu vi mem iam venos al Francujo ?

Kore salutas

**Berto Ŝuman, el Francio**



Gratulon pro la belega Turka Stelo! Dankon pro la aperigo de mia poemio! Kore,

**Nazaré Nazare Laroca, el Brazilio**



Dankon pro tio, ke vi sufiĉe multe parolis pri italaĵoj.

Amike

**Renato Corsetti, el Italujo**



Kara amiko

Mi ĵus ricevis la numeron 24.

Vi faras mirinde belan laboron! Mi tre gratulas vin.

Bonvolu noti, ke Claude Piron mortis en januaro 2008. Aperos paĝo pri li en la revuo Esperanto .

Amike

**Mireille Grosjean, el Svislando**



Estas kurioze ke, ĝuste hodiaŭ, kiam finiĝas televida semajna dokumentara filmo pri Turkio "Les mille et une Turquie"\* (Mil kaj unu Turkio) ĉe la franca-

germana kanalo ARTE, plue spektebla dum 7 tagoj post la elsendotago, mi ricevas tra Japanio, de nia amiko HORI Jasuo, PDF de riĉenhava kaj simpatia 32-

paĝa tutkolora kaj abunde ilustrita revuo "Turka Stelo" kun tre varia enhavo. Ne hezitu peti ĝin de li ĉe <horizonto[ĉe]water.sannet.ne.jp> aŭ rekte de la redakcio el Turkio Vasil Kadifeli <vasilkadifeli[ĉe]gmail.com>

Same per la filmo kiel per tiu revuo ni ricevas pri la turka popolo simpatian kaj interesan bildon dum politiko forpuŝas ĝin el la emo konatiĝi kun ĝi kaj eĉ malproksimigas ĝin el Eŭropo. Dankon al la redakta skipo. Ni gratulu kaj kuraĝigu ĝin.

<https://www.arte.tv/fr/search/?query=Mille%20et%20une%20Turquie&page=1>

**Henri Manson, el Francujo**



Saluton kara "Turka Stelo", Koran dankon por la revujo, kiu jam estas en mia domo. Mi rapide trarigardis ĝin matene. Mian artikoleon mi vidis kaj tio estas nia Esperanto amikeco. Vespere mi legos ĉion kun plezuro. Salutojn kaj sanon por vi.

Amike

**Angel Maglov, el Bulgario**



Saluton,

Mi ricevis vian bultenon per reto kaj ĝoje legis ĝin..estas belege kaj tre interese.

Do, mi ŝatus peti vian permeson por publikigi unu artikolon de ĝi.

Ni elektis la artikolon de s-ro Spiro Sarafian el Grekio kiu troviĝas sur la paĝo 10a - 11a.

Antaŭdankon!

Amike via,

**Ilia Dewi, el Indonezio**

## Novjara Bondeziro de Angel Maglov el Bulgario

# A

l estimata revuo - "TURKA STELO".

Salutante la belan Esperanton revuon, mi deziras al la redaktoro sanon kaj sukcesan laboron dum la nova jaro

2018!

Viaj legantoj atendas vian revuon.

Feliĉan novan jaron 2018 al ĉiuj legantoj de la revuo !

Mi sendas al ĉiuj unu novjara korton kun slavaj literoj - Ч Н Г kiu signifas **GRATULON** por la **NOVA JARO** !

Amike,

**Angel Maglov el Bulgario**



## Mortodatreveno de Claude Piron

**E**n la 22-a de januaro 2008 mortis la fama Esperantisto **Claude PIRON**.



Claude PIRON (naskiĝis la 26-an de februaro 1931 en Namuro, mortis la 22-an de januaro 2008 en Gland) estis svisa esperantisto, lingvisto kaj psikologo.

Li diplomitiĝis ĉe la interpretadolernejo de la universitato de Ĝenevo; de 1956 ĝis 1961 li ankaŭ estis tradukisto por Unuiĝintaj Nacioj (el la ĉina, el la angla, el la rusa kaj el la hispana en la francan); poste li plu tradukadis tutmonde por la Monda Organizaĵo pri Sano ĝis 1969. Post edukado al psikanalisto kaj psikoterapeŭto li laboris en la regiono de Ĝenevo kaj ekde 1999 en Gland. De 1973 ĝis sia emeritiĝo en la jaro 1994 li krome instruis psikologion kaj eduksciencon ĉe la universitato de Ĝenevo. Li krome instruis, konsilis kaj superrigardis junajn psikologojn.

En Esperantujo, li nomis sin *Klaŭdjo*. Interalie, li estis membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA kaj membro de Esperantlingva Verkista Asocio.

Li verkis multajn Esperantajn verkojn. Li ankaŭ uzis Esperanton en multaj landoj, inkluzive de Japanio, Ĉinio, Uzbekio, Kazaĥlando kaj kelkaj lokoj en Afriko kaj Latina Ameriko, kaj preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. Li instruis Esperanton ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko.

En multaj prelegoj kaj publikaĵoj li traktis demandojn pri psikologio kaj internacia komunikado.

Li estis psikoterapiisto kaj instruis en la psikologia fako de Ĝeneva Universitato (Svislando), de 1973 ĝis 1994. Lia franclingva libro "Le Défi des Langues - Du

gâchis au bon sens" (La Lingva Defio - El ĥaoso al sana prudento) estas speco de psikanalizo de la internacia komunikado.

Lia verkaro inkluzivas lernolibrojn, facilajn legaĵojn, romanojn, novelojn, poezion, faktolibrojn kaj artikolojn. Liaj plej famaj verkoj estas Gerda Malaperis kaj La Bona Lingvo. Li ankaŭ verkis romanojn sub la pseŭdonimoj Johán Valano kaj Johán Balano.

Gerda Malaperis estas romaneto, lernolibro kiu uzas bazan gramatikon kaj estas aranĝita tiamaniere, ke ĉiu ĉapitro kompreneblas pli facile ol la posta; ĝi laŭgrade kondukas al sperta esperanto; fine, vortlistoj ekzistas por kelkaj lingvoj, do komencantoj facile sekvas la lecionojn. Ĝi jam iĝis bazo de unu el la senpagaj retpoŝtaj kursoj.

En "La Bona Lingvo", Piron kaptas la bazajn lingvistikajn kaj sociajn aspektojn de Esperanto. Li tezas, ke Esperanto pli facilas ĉar ĝi respegulas bazajn mensajn principojn rilate al lingva lernado, interalie kaj plej grave, la ĝeneraligo de gramatikaj formoj kaj reguloj. Li argumentas kontraŭ enporto de novaj radikoj, montrante la esprimovon de baza vortprovizo kaj imagema kunmetado.

Piron tradukis kantojn el pluraj lingvoj kaj fojfoje mem prezentis ilin, akompanante sin per gitaro. En 1982 ĉe LF-koop, aperis lia son-kasedo "Frandu Piron".

Fonto: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Claude\\_Piron](https://eo.wikipedia.org/wiki/Claude_Piron)



Jen por vi la elŝuteblaj verkoj de Claude Piron: <http://esperanto.org.uk/eldonoj/piron/>

## Amo

**"M**ia amiko ne revenis el la batalkampo, sinjoro. Mi petas vian permeson por iri serĉi lin".

"Mi malpermesas", respondis la oficiro, "mi ne volas ke vi risku vian vivon por viro, kiu eble jam estas morta".

Ignorante la malpermeson, la soldato eliris kaj revenis unuhoron poste, morte vundita, kaj kun la kadavro de sia amiko.

La oficiro koleris: "Mi avertis vin, ke li estas morta! Nun mi perdis du virojn! Diru, ĉu valoris la penon iri al la batalkampo por reveni kun kadavro?"

Kaj la mortanta soldato respondis: "Kompreneble sinjoro! Kiam mi trovis lin, li ankoraŭ vivis kaj povis diri



al mi: « Amiko... mi estis tute certa ke vi venos »".

el "La preĝo de la rano"  
de **Anthony de Mello**  
tradukis **Liven Dek**

## Aranefobio

**E**stis bela aŭtuna tago. Enirante mian oficejon, mi rigardis tra la fenestro por plenigi miajn okulojn per blua ĉielo antaŭ eklabori. Anstataŭe mia rigardo renkontis teruraĵon: monstran araneegon!!

Nu, bone, eble ne tiom danĝera, eble ne tiom ega... sed monstra por mi!

Ekde mia plej juna aĝo, mi malŝategas tiujn bestojn.

Dum la tuta mateno, mi provis forgesi pri ĝi. Mi ne volis rigardi tien, sed mia okulo iel ĉiam kaptis ĝian teruran bildon, ie tie, atendante min en la angulo...

Ne! Mi ne suferos tiel dum alia labortago. Mi devas fari ion. Sed kion?

Ĉu mi petu helpon de mia sekretario? Aŭ de kliento? Ĉu mi voku mian ekson !?

Kuraĝon Suzano! Vi devas alfronti viajn timojn. Pli facile diri ol fari. En miaj premsonĝoj, araneoj atakas kaj estas preskaŭ nemortigeblaj. Mi konscias, ke temas pri araneofobio. Tamen...

Tuj post foriro de mia lasta paciento, mi iris al librobreto por elekti taŭgan armilon, Sufiĉe malmolan. Sufiĉe dikan. Ne tro: mi ne volas rompi la vitron! Pensante pri tiu ebleco, ke mi povus maltrafi ĝin kaj...

Haltu! Ne pensu pri tio. Vi ne maltrafos ĝin.

Libron en mane, mi eliris kaj ĉirkaŭiris la domon, kun rezoluteco en la okuloj. "Ĝi mortos", mi pensis. Araneoj (nu, en miaj sonĝoj), krakante kiam oni


## sendis Suzanne Roy, el Kanado

provas premmortigi ilin, aŭdigas neelteneblajn sonojn. Ĉar timigis min aŭdi tion, laŭta krio akompanis mian firman atakon.

"JJAAAAĤĤĤ!!" kaj samtempe "VLAM!" Jen! Mi venkis.

Koncentrante je mia celo, mi tute ne rigardis antaŭe, ĉu estas iu en la ĉirkaŭaĵoj. Iom tremante post tiu grava venko, mi returnis min kaj vidis, starante apude sur la trotuaro, ridetantan sinjoron, kiu diris: "Mi pensas, ke ĝi ja mortas!"

Reenirante mian oficejon, miaj vangoj ruĝiĝis pro diversaj samtempaj emocioj: malpeziĝo, honto... sed ĉefe fiereco.



verkis **Suzanne Roy**, el Kanado



## Kiel mi lernis Esperanton

**M**i lernis Esperanton tuthazarde en la jaro 1984. Mi volus partopreni junularan laborbrigadon en Hungario sed mi havis trafikajn akcidentojn kaj malfrue alvenis Budapeŝton. Mi trovis la adreson kaj estis junulo en la oficejo kiu paroletis nur la anglan. Mi diris al li, ke mi partoprenos la junularan laborbrigadon sed li informis min ke ĝi jam finiĝis. Mi diris al li, ke mi pagis (preskaŭ) 46 eurojn al la agentejo kaj tio estis por mi trezoro tiam.

Li pensis iomete kaj poste diris al mi, ke estis Esperanto kurso en urbo Eger. Mi demandis "Kio estas ESPERANTO?" Li respondis "LINGVO". Mi diris al li: "Se estas lingvo, mi ŝategus lerni ĝin!" kaj mi plue demandis "Kiom da tagoj daŭras la kurso?" pensante, ke la kurso daŭros semajnojn. Li respondis: "8 tagojn!". Mi estis ŝokita kaj diris: "Ĉu nur 8 tagoj? Ĉu oni povas lerni lingvon dum 8 tagoj?" Li respondis: "Tiu ĉi estas facila lingvo." Mi diris al li "Eble la lingvo similas al la hungara lingvo kaj estas facila por vi sed

## sendis Murat Özdizdar, el Turkujo

ne por mi." Li respondis: "PARTOPRENU kaj MEMSPERTU".

Ni kune aĉetis bileton el Keleti stacidomo al Eger kaj li diris al mi "Iu maljunulo atendas vin en la stacidomo kun verda stelo."

Mi finfine alvenis al Eger. Mi vidis la verdan stelon sed anstataŭ la maljunulo venis tri belulinoj por konatiĝi kun la turko. Ni havis komunan pasintecon sed ili neniam ekvidis turkon. Do mi eklernis la lingvon kaj nun mi instruas ĝin ĉirkaŭ la mondo kaj vojaĝas per ĝi jam 33 jarojn.

Mi devas aldoni, ke tiu junulo, kiu instigis min lerni Esperanto estis Sandor Hideg, kiu estis prezidanto de Hungara Junulara Asocio.

verkis **Murat Özdizdar**

**U**nu estas fama ankaŭ en Okcidento, ĉar li tradukis mem siajn poemojn al la angla, kaj tial ricevis en 1913 la Nobel-premion pri literaturo (sed la etoso ankoraŭ estis rasisma en Eŭropo tiam, kaj aperis en iu gazeto ŝerca desegnaĵo montrante vicon da nigruloj, ĉinoj, ktp, nu ĉiuj la « malsuperaj rasoj » - tio estas ĉiuj la ne okcidentanoj ! - atendantaj por ricevi sian Nobel-premion, tio estas, ke la desegnisto kaj intencitaj legontoj de tiu gazeto konsideris doni premion pri literaturo al neeŭropano kiel ridindan ideon !

Tiu famulo estas RABINDRANATH TAGORE (fakte Rabindranath Thakur; bengale রবীন্দ্রনাথ ঠাকুর) Jen lia eble plej fama poemo en la okcidenta publiko, kiun oni povis plurfoje aŭdi legita ĉe la franca radio, eble ties fameco ŝuldiĝas al tio, ke ĝi estas ne nur bela sed parolas pri infanoj ! Kaj ke ĝi ŝajnas facila por kompreni kaj ne religia, male al aliaj poemoj de Tagore; sed fakte ankaŭ ĝi ja havas religian senco !

#### « POEMA OFERDONO » - poemo n° 60

Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj infanoj sin kunas.  
Super ili senlima senmovas blua ĉiel', apud ili la senhaltaj ondoj bruadas.  
Sur marbordoj de la mondoj senfinaj infanoj kunas sin kun dancoj kaj krioj.

Siajn domojn ili konstruas el sablo, ludas per konkoj malplenaj.  
Per folioj velkintaj ili garnas siajn ŝipojn kaj kun rideto lanĉas ilin sur la maron senfundan.  
La infanoj plenumas siajn ludojn sur la plaĝoj de la mondoj.

Ili ne scipovas naĝi, ili ne scipovas fiŝkapti.  
La perllokolektistoj ekprofundiĝas, la negocistoj ekvelas ; la infanoj dume kunigas rulŝtonojn, kaj poste ilin disigas.  
Ili ne serĉas kaŝitajn trezorojn, ili ne scipovas fiŝkapti.

La fluso venas kun rido kaj la plaĝo, pala helo, ridetas.  
La ondoj mortoplenaj kantas al la infanoj necertajn baladojn, kiel patrino al la bebo.  
La fluso ludas kun la infanoj kaj la plaĝo, pala helo, ridetas.

Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj infanoj sin kunas.  
La ŝtormoj vagas tra la ĉiel' sen vojoj, la ŝipoj pereas en la maro sen trako, morto gvasas kaj l'infanoj ludas.

Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj okazas la granda kuniĝo de la infanoj.

**L**a dua estas eble eĉ pli fama, krom en Okcidento, kie li estas preskaŭ nekonata. Sed li estas deklarita oficiale la Nacia Poeto de Bengladeŝo. Temas pri KAZI NAZRUL ISLAM (bengale কাজী নজরুল ইসলাম )



Dum Tagore estis hindua kaj el riĉa familio, Kazi Nazrul Islam estis islamano kaj el malriĉa familio. Dum Tagore restis sore super la politikaj temoj, poeziante el religia inspiro, Nazrul partoprenis la politikan lukton kontraŭ la koloniantaj britoj, kaj estis dum tempo en karcerio. Kvankam islama li edziĝis kun hinduino, kaj en siaj poemoj uzis ne nur islamajn temojn sed ankaŭ hinduajn. Jen lia poemo

#### « ŜTELISTOJ KAJ RABISTOJ »

Kiu ŝtelist' nomas vin ? amik', kiu rabist' ?  
Ĉie ŝtelistoj marŝas, kaj regas rabistoj  
Ĉu ia Daniel' juĝos al ŝtelistoj  
Ĉu iu ajn sur ter' ne estas ekpluatist' ?

Plejalta juĝ' tenu sceptron ! ĉar granduloj  
Nur pro ŝtelinte malfortulojn grandas.  
Ju pli vastas la ŝtel', ekpluato friponas,  
Des pli altas status' de l'modernaj regnoj.

Kreskas palacoj el seka sang' de subpremataj gentoj,  
Profitojn altigas kapitalistoj detruante hejmojn,  
Kia fiinfera maŝin' estas ĝi nutrita per homa karn' ?  
Vivaj geviroj enen, eleniĝas rekrementa sukerkan'

Uzinoj elpremas el miloj da homoj la homecon,  
Por al milionuloj plenigi vinglasojn kaj orkestojn  
Uzuriston dikventrigas manĝ' bezona je l'malsataj  
Posedanto ruinigas hejmojn por akiri la kaleŝon.

Negoca pens', faris de l'mond' prostituejon  
Malico kaj Malbono servilaj sklavo  
Pokaltenante kantas al ĝi kanton de avido

Homo perdis manĝon sanon vivon kaj esperon  
Kaj parolrajton, bankrotita kuras li  
Al nepra detruig'. Ne videblas eskapvojo,  
Ĉar tutĉirkaŭ 'stas fosaĵoj instalitaj de monavid'.

La tuta mond' 'stas karcerio, ŝtelistoj ties provoso.  
Ŝtelistoj al ŝtelist' svatiĝas,



Friponoj inter fi fratiĝas.

Kiu ŝtelist' nomas vin ? amik', diras, ke vi ŝtelis ?  
Nur kelkajn monerojn, rizbovlojn vi prenis,  
Sed ne ponardon vi ŝovis en homkoron.  
Ne malhoma estas vi kvankam ŝtelist'.  
Kiel Ratnakaro vi povas iĝi Valmik' \*,  
Se nur renkonti veran homon.

(esperantigis el la angla traduko **R. Platteau**)

\* **Valmiki**, la aŭtoro de fama epopeo *Ramajano*, nomiĝis fakte *Ratnakaro* kaj estis rabisto, legendo rakontas pri lia renkonto kun saĝo *Narado* post kio li mem fariĝis saĝo.

## Profunda, longa bedaŭro

## sendis Haluk Mesci, el Turkujo

**K**iam mi malfermis miajn okulojn mi estis sur ferdekseĝo parolanta per la telefono.

Mi iel finis la frazon, kies komencon mi ne sciis, kaj tute ne komprenis tion, kion mi diris.

Estis ia eĥo el la profundo. Mi estis parolanta trankvile sed tra ia vasta kaj longa tubo. Mia voĉo, mia orelo, mia menso estis ŝvebantaj konfuzite en la sama vasta malplenaĵo.

Okazis silento kiam mi finis la frazon.

Kaj el la alia fino ankaŭ ne aŭdiĝis io ajn.



Mi supozis ke estis iu en la alia fino. Mi certas pri tio. Se mi estis sur la telefono, tiam oni devas esti en la alia fino. Krom se mi estis parolanta kun mi, per la aŭdilo en mia mano.

Sed kun kiu mi estis parolanta?

“Bone” diris la alia, kun demanda mieno. “Poste?”

Tiu estis iu virino.

Pasis ankoraŭ iom da tempo.

Nenio.

Poste mi sentis profundan kaj longan bedaŭron. Tamen mi trovis miajn sensojn eĉ se mi ne estis scianta kun kiu kaj pri kio mi estis parolanta.

Mi sentis ian nodon en mia gorĝo. Mi glutis ĝin.

Mi komencis ploreti.

La alia diris – ŝi estis iu virino sed kiu? – “pardonu min, mi forgesis vian vizaĝon. Mi eĉ ne scias se mi vin konas, sed, kial...”

...

Mi fermis miajn okulojn. Mi fermis la telefonon. Mi kuŝis sur la ferdekseĝo.

Mi provis trovi la manieron fini la frazon pri profunda longa bedaŭro.

Eĉ se mi ne sciis la kialon.



verkis **Haluk Mesci**, el Turkujo  
tradukis **Vasil Kadifeli**, el Turkujo

## De kie devenas la nomoj de valutoj?

## sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

**K**omuna valuto de Eŭropa Unio EŬRO videble devenas el la nomo de kontinento Eŭropo. Sed de kie venas aliaj nomoj? Estas interese iom "detektivi".

Kelkaj nomoj devenas de la bildo sur iu flanko (averso / renverso) de la monero. Plej konata estas KRONO, simbolo de reĝa potenco, ekzemple en Ĉeĥio, Slovakio, Danio, Norvegio, Svedio... Reĝan potencon simbolis ankaŭ leono sur ŝildoj de militistoj. Rigardu rumanan LEI kaj bulgaran LEVO. La portugala ESKUDO signifas ŝildon. La monero ofte surhavas krucon, simbolon de kristanismo. De tio devenas nomo de brazila KRUZEJRO, aŭ malnova aŭstra KREJCERO. Ofte portreto de la reĝo ornamis moneron. Jen la deveno de la hispana REALO, ekzemple.

Nomo de la mono venas de oro, el kiu komence oni monerojn faris, aŭ de la marko, kiu atestis pri konstanta valoro de la metalo: ZLOTO en Pollando,

GULDENO en Nederlando, AŬRO en Islando, MARKO en Germanio kaj Finnlando.

La ganaa CEDO signifas konkron – iama pagilo.

La nomo povas ankaŭ montri pezon de la metalpeceto, kiel ekzemple itala LIRO kaj brita PUNDO, same hispana PESETO.

Fine, TALERO (DOLARO) sian nomon ricevis de la germana produktoloko en la 16-a jarcento: Joachimsthal. La signifo de la vorto talero: aĵo el Joachima valo.

Ĉu vi scias de kio venas la nomo de via mono? Se jes, skribu al ni. Ni tre scivolas.

verkis **Zoltan Kurucz**, el Hungario  
fonto: [http://esperanto.wz.cz/Legolibreto\\_1.pdf](http://esperanto.wz.cz/Legolibreto_1.pdf)





## Dialogo inter Luiza CAROL kaj Mirejo GROSJEAN (Parto 1)

### **D** DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO

*Luiza verkis eseon, rande de kiu Mirejo komentas kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas.*


### Unua parto: ĈU MI ATINGIS LA DEKOMENCAN CELON?



**Luiza:** La 11-an de aprilo 2005 mi premis la komputilan butonon por aliĝi al la programo “lernu!” ([www.lernu.net](http://www.lernu.net)). Hodiaŭ, post 10 jaroj de esperantista vivo, mi provas rememori pri miaj tiamaj atendoj kaj supozoj, por kompari ilin kun miaj nunaj maturaj

opinioj rilate la socian fenomenon nomatan Esperanto.

Mi decidis eklerni la lingvon, post kiam mi legis brilant eseon de Claude PIRON, titolitan “Psychological Reactions to Esperanto” (Psikologiaj reagoj al E-o). Mi estis tiam 58-jaraĝa. Min ne aparte interesis la E-e parolanta komunumo mem, ĉar mi opiniis, ke lingvo tute ne estas kriterio, laŭ kiu indas ekamikiĝi. Mi jam scipovis kvar etnajn lingvojn, tial mi tute ne sentis mankon de “pontolingvo” por ekamikiĝi aŭ por legi. Kion mi scivolegis ekkoni estis la E-a kulturo, kies ekzisto perpleksigis min. Precipe la originalan E-an literaturon mi deziris malkovri rekte, sen la pero de etnalingva traduko. Tiam mi rezonis, ke lingvo ne kapablas formi homajn karakterojn, tial la esperantista komunumo ne povos ŝajni al mi tro malsimila al ajna alia lingva komunumo, kiun mi jam konis. Evidentiĝas, ke mi malpravus. Mi kredas, ke lingvolernado mem ne formas personecojn.



**Mirejo:** Kara Luiza! Mi tendencus opinii, male al vi, ke malkovro de lingvo, de ties strukturo, de ties sintakso, lasas spurojn en la menso de la lernanto. Akiro de konoj pri alia kulturo riĉigas la lernanton kaj ebligas al li/ŝi ĵeti novan rigardon al siaj propraj lingvo kaj kulturo. “Wer keine fremden Sprachen kennt, weiss nichts von seiner eigenen.” skribis Goethe,

fama germana sciencisto, filozofo kaj verkisto. (Tiu, kiu scipovas neniun fremdan lingvon, scias nenion pri

sia propra). Plie lernante E-on, iu eniras en pensmanieron tutmondan: mi estas membro de la homa familio! Kara Luiza! Ĉu vi povas akcepti tion?

**Luiza:** Mi konsentas pri tio, ke lernado de ajna lingvo lasas spurojn en la menso de la lernanto kaj verŝajne influas pozitive la kapablojn de ties cerbo. Mi konsentas kaj ĝisoste konsentas, ke akiro de konoj pri alia kulturo riĉigas la mensojn kaj la animojn. Jes, mi renkontis homojn rifuzantajn lerni aliajn lingvojn krom la denaska, kaj mi ĉiam konstatis, ke ĝuste tiuj malbone uzas la denaskan lingvon. Mi konis homojn, kiuj rifuzis dediĉi sian energion por konatiĝi kun alia kulturo krom la denaska, supozante ke tiamaniere ili restos pli “fidelaj” al sia denaska kulturo; sed en ĉiuj tiaj kazoj, mi havis la fortan senton, ke ilia aliro al sia denaska kulturo restas nur supraĵa. Pri unu sola afero mi havas malsimilan sintenon: mi ne konsideras la vortojn “lingvo” kaj “kulturo” sinonimoj, kvankam inter lingvo kaj kulturo ekzistas grandega interdependo. Oni ofte aŭdas la metaforon: “lingvolernado estas fenestro al la ekstera mondo.” Tiu metaforo ja ŝajnas al mi taŭga, sed oni ne konfuzu la fenestron kun la ekstera mondo. Mi kredas, ke ne la fenestro kontribuas al la formado de nia personeco, sed tiu fragmento el la ekstera mondo, kun kiu ni konatiĝas pere de la fenestro. Ni mem selektas tion, kion ni deziras esplori pere de la lingvo kaj kiel interpreti la rezultojn de niaj esploroj. Kiel lingvo-instruistoj, ni helpas la lernantojn akiri mirindan “fenestron”, kaj ankaŭ prezentas al ili kelkajn vidindaĵojn tra la “fenestro”.

Al mi ŝajnas, ke en la procezo de formado de mia personeco, la konatiĝo kun diversaj kulturoj ne estis vere dependa de lingvolernado. Tial mi inklinas kredi, ke lingvolernado ne kontribuis per si mem al la formado de mia personeco. Mi tuj klarigos kial.

Ĝis nun, mi lernis je pli-malpli flua nivelo 4 nedenskajn lingvojn: la francan, la anglan, la hebrean kaj E-on. (Mi evitis ĉi-supre la vorton “fremda”, ĉar lingvon, kiun mi jam uzas – eĉ malperfekte – buŝe kaj skribe, mi ne plu konsideras “fremda”.) La lernado de tiuj 4 lingvoj ja faciligis por mi alirojn al diversaj kulturoj, kiuj kontribuis kaj kontribuas al la formado de mia personeco. Malgraŭ tio mi sentas, ke la nedenska kulturo, kiu plej gravas por mia vivo estas, la joga tradicio pri meditado kaj fizikaj ekzercoj, kvankam mi konatiĝis kun tiu fascina aspekto de la hinda kulturo nur pere de tradukoj. Verkistoj kiel HOMERO, Hans Christian ANDERSEN, Miguel de CERVANTES k.a. forte influis miajn animon kaj menson nur pere de tradukoj. Cetere mi sentas, ke eĉ pli grava ol kulturo

mem estas la maniero laŭ kiu oni interpretas ĝin. Miguel de CERVANTES kaj la fanatikaj Grandaj Inkvizitoroj de Hispanio parolis la saman lingvon kaj kreskis ene de la sama etna kulturo... sed kiom malsimilaj personecoj! Rilate la interpretadon de kulturaj tradicioj, oni povas diri, ke la maniero, laŭ kiu oni prezentas al la infanoj ties etnan kulturon kaj ankaŭ aliajn kulturojn estas ege grava. Nun, kara Mirejo, mi rememoras vian bonegan prelegon pri porpaca edukado, kiun mi ĉeestis en la aŭtuno de 2009 en Svislando. Revenante hejmen, mi ofte pensis pri viaj ekzemploj kaj meditis pri la fakto ke, pere de la sama lingvo, oni povas eduki infanojn kun la intenco formi ontajn honestajn civitanojn, aŭ kun la intenco formi ontajn fanatikajn monstrojn... Tio pruvas, ke homaj personecoj havas gravegan rolon en la formado de aliaj personecoj kaj de siaj propraj. Tiu tutviva procezo okazas plej ofte senkonscie, pere de lingvoj aŭ/kaj pere de aliaj "fenestroj": muziko, danco, vidartoj k.a.

Kaj nun mi atingas la plej tiklan parton de la problemo. Kion diri pri tiuj kazoj, kiam du ĝemelaj fratoj akiras tute malsimilajn personecojn, kvankam ili kreskis samtempe en la sama familio, parolis la saman lingvon kaj estis edukitaj en la sama kulturo fare de la samaj instruistoj...? Mi mem ne havis gefratojn, sed hazarde mi bone konis bedaŭrindan, eĉ tragedian kazon, kiam du fratinoj akiris tute kontraŭajn personecojn, kaj tio kondukis al dumvivaj terure dolorigaj konfliktoj. Fakte mi kredas, ke formado de homa personeco estas unu el la grandaj mirakloj de la mondo, kies misterojn oni ankoraŭ ne konas ĝisfunde...

Laŭ mi, ĉiuj el ni estas parto de la tuta mondo ekde nia naskiĝo. E-o helpas nin konsciiĝi pri tiu ĉi aparteno, ĉar E-o estas eksterordinare bona ilo por komunikado inter etnoj. Sed se ni utiligos tiun ilon por ofendi kaj malhelpi unuj la aliajn, nenion pozitivan ni povos atingi, eĉ regante perfekte la pronomon "si" kaj la verbajn participojn. Mi kredas, ke indas uzi konscie kaj saĝe tiun mirindan "fenestron" al ĉiuj kulturoj de la mondo, por plibonigi niajn proprajn vivojn kaj la socian ĉirkaŭaĵon.

**Luiza:** ...Sed ĉiuj aliaj lingvaj komunumoj ne vere elektas sian lingvolernadon... Etnajn lingvojn oni lernas ĉu denaske (pere de tiu mistera lingva instinkto, kiun ni ĉiuj konas sed ne kapablas ĝisfunde kompreni), ĉu laŭbezone (kiam iun etnan lingvon oni altrudas al ni en la lernejo, kiam la ondoj de la vivo igas nin enmigri en alian landon, kiam iu etna lingvo estas necesa por nia kariero, kiam iu etna lingvo estas la denaska lingvo de persono, kun kiu ni deziras

edziĝi aŭ edziniĝi ktp.). Malsimile al tio, E-on estas ni mem kiuj elektas, krom kelkaj tre raraj esceptoj, kiam infanoj akiras ĝin en e-istaj familioj. La plenkreskaj personoj, kiuj decidas eklerni ĝuste tiun lingvon, havas tre diversajn kialojn por fari tion, tamen kutime kundividigas kelkajn gravajn ĝeneralajn trajtojn. Per la lingvolernado mem ne formiĝas apartaj homaj personecoj, sed kutime E-on elektas plenkreskuloj, kiuj jam havas apartajn homajn personecojn antaŭ ili esperantistiĝas. Ni ofte konsideras unuj la aliajn "stranguloj", sed preskaŭ neniam konsideras unuj la aliajn obeemaj, imitemaj, pretaj sekvi modojn, kliŝojn kaj konvenciojn senpripense ŝafmaniere. Nia plej grava komuna trajto ŝajnas al mi la deziro interkomunikiĝi, por ekkoni aliajn tradiciojn, aliajn kulturojn. La plej evidentaj ecoj, kiuj plej ofte difinas la personecojn de miaj nunaj e-istaj geamikoj, estas scivolemo, eksperimentemo, malfermiteco fronte de novaj ideoj, respekto por la tradicioj de aliaj etnoj, deziro lerni por larĝigi sian horizonton, optimisma fido je la homa kapablo plibonigi sian propran karakteron kaj helpi al la plibonigo de la tuta socia vivo...

**Mirejo:** Kara Luiza! Ĉi tie mi tute samopinias kiel vi. Kiam mi restadis en Japanio, mi demandis al miaj amikoj tie: Ĉu vi estas "normalaj" japanoj? Verŝajne ne, ĉar tiuj japanaj esperantistoj estas, kiel vi tute prave priskribas, scivolemaj, malfermitaj. El tio ni povus dedukti, ke ni akiras ne precizajn ideojn pri iu popolo per kontakto kun esperantistoj el tiu popolo. Kion vi opinias pri tio?

**Luiza:** Mi estas judino. Mi ne scias, kion signifus tipa judo, se entute tia kuriozaĵo ekzistus. Por malkovrition, kion signifus tipa judo, oni devus prepari ampleksan statistikon baze de longa demandaro, al kiu respondus judoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo kaj apartenantaj al tre malsimilaj tradicioj eĉ ene de la sama lando... Ĝis oni finus tian grandiozan esploron, pasus minimume jardeko kaj la tuta materialo jam eksdatiĝus. Eĉ se eblus trovi en la tuta mondo unu strangan kreitaĵon, kies trajtoj kongruus kun tio, kion oni konsiderus la tipa judo... tiu kreitaĵo ne interesus min. Mi ne deziras simili iun ŝablonon kaj ankaŭ ne deziras malsimili ĝin. Sekve de tio, al mi indiferentas ankaŭ la etna tipeco aŭ multipeco de miaj konatuloj. Cetere, laŭ mia sperto, tre ofte la ĝeneralaj ideoj pri etna tipeco koncerne homajn personecojn estas malnovaj antaŭjuĝoj, ofte jam tute maltaŭgaj niatempe, kelkfoje eĉ ofendaj. Precipe ĉi lastajn mi ne ŝatas disvastigi, ĉar laŭ mi la antaŭjuĝoj malutilas al la plibonigo de interhomaj rilatoj.

**Mirejo:** Kara Luiza! Vi tute pravas, ke stereotipoj estas danĝeraj bestoj... Male, ĉiu individuo estas unika kaj koninda.

**Luiza:** ...Ĉiujn ĉi ecojn mi trovas kaj ŝatas ankaŭ ĉe miaj ne-esperantistaj amikoj, sed mi sentas, ke en la E-eparolanta komunumo ili aperas proporcie pli ofte ol en aliaj medioj. Tial mi amas la e-istan komunumon kaj prifieras aparteni al ĝi. Sen tiu sento, mia scivolo pri la internacia lingvo verŝajne estintus elĉerpiĝinta post nur kelkaj monatoj de lernado, kaj mia intereso pri la E-a kulturo verŝajne estintus vaporiĝinta eĉ antaŭ ol mi kapablis gustumi ĝin... La etnaj lingvoj kaj kulturoj estas pli-malpli spontanaj sociaj fenomenoj, dum E-o ekzistas kiel konscia socia fenomeno. Ĝuste tial ĝi havas i.a. la gravan rolon konsciigi al ni kio

estas lingvo kaj kio estas kulturo. Alivorte, ĝi pensigas nin pri tio kio estas homo. Mia dekomenca celo iom post iom ŝanĝiĝis: mi ekdeziris fariĝi parto de la Esperante parolanta komunumo kaj kontribui al ĝia kulturo.

**Mirejo:** Kara Luiza! Jes ja, vi kontribuas al ties kulturo, eĉ brile! Vi verkas por ni pri lernado de Esperanto, vi verkas belajn rakontojn por nia revuo "Juna Amiko" kaj vi korektas "Internacian Pedagogian Revuon" atenteme. Ricevu nian elkoran dankon!

**Luiza:** Dankon pro via aprezo.

Fonto: **ILEI - IPR Revuo 2016-2**

(daŭrigota)

## Kun Esperanto-sumoo ĉirkaŭ la mondo

**D**um la renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj sub la monto Poludnica (Slovakio) komence de la jaro 2017 prezidanto de Pola Esperanto Asocio (PEA) Aleksander Zdechlík prezentis



ESPERANTO-SUMOON. Ekde tiam mi komencis serioze legi laŭ Esperanto-Sumoa ritmo eble kiel unua slovakio.

Dum la antaŭ menciita renkontiĝo mi jam planis vojaĝi ĉirkaŭ la mondo kaj ankaŭ Aleksander Zdechlík aprobis la ideon kaj mem volis partopreni la ekskurson. Post kelkmonataj preparoj okazis, ke la dato de la vojaĝo estis sama kiel la 49-a novembra E-sumoo 2017. La vojaĝon partoprenis du e-sumooistoj – jam menciita Aleksander Zdechlík el Pollando kaj Jano Vajs el Slovakio. Antaŭ vojaĝo estis problemo kiel enplekti en vojaĝprogramo la ĉiutagan legadon de la 12-a ĝis la 27-a de novembro. Por preskaŭ unumonata vojaĝado ni povis paki nur unu kofron pezan maksimume 20 kg. Dua problemo estis tempa diferenco inter unuopaj landoj, kiujn ni vizitis kaj ebleco komuniki kun prizorgantoj pri niaj rezultoj. Aleksander decidis preni



## sendis Jano Vajs, el Slovakio

revuon „Homo kaj kosmo“ kaj legi po du paĝojn tage. Tio estis bona decido, ĉar unuopaj kajeroj de la magazeno estas maldikaj. Mi estis limigita laŭ la plano de mia E-klubo. Decembre okazos kadre de la Zamenhofa tago diskuto pri libro. Elektita estis la vojaĝpriskribo de Jan Welzl „Tridek jarojn en ora nordo“. La libro estis sufiĉe granda kaj parte plenumis mian dorsosakon.



Duope ni legis kaj unu kontrolis la duan, ĉu ni regule luktas. Tial ni legis matene aŭ vespere, en aviadilo aŭ sur ŝipo, sataj aŭ malsataj, soifantaj aŭ trinkataj teon. Niaj kunvojaĝantoj nur kaptunis kaj komence nekomprenis kion ni faras. Al kelkaj ni klarigis principojn kaj ĉefe ideon de la lukto kaj videble ilin interesis tio. Tial ni travojaĝis el niaj patrolandoj tra Parizo ĝis Dubajo. En ĝi estis grandaj diferencoj de varmo inter urbaj stratoj kaj klimatizigitaj busoj. La plej bonaj kondiĉoj estis sur belaj plaĝoj de Maldivoj. Ankaŭ en tropika ĝangalo de Sri Lanko estis agrable legi vojaĝante per trajno al tereno kie oni teajn arbustojn kultivas. En Singapuro estis la plej malfacila periodo, ĉar la urbo estis tre interesa kaj ni havis tuttagan programon ĝis profunda nokto. Vole-nevole ni devis pli frue ellitiĝi kaj legi. Lastan luktan tagon mi



travisis en aviadiloflugante el Singapuro tra Brisbano al Aŭcklando en Nova Zelando. Intersurteriĝo en Brisbano en Aŭstralio mi eluzis por skribi lastan raporton al mia prizorganto, kiu estis Vasil Kadifeli. Mia kolego sufiĉe rapide tralegis, ĉar jam en Singapuro li sendis raporton al Renato Petrovic. Ni estis feliĉaj, ke ni venkis kaj samtempe ni prezentis Esperanton kaj sumoon antaŭ niaj kunvojaĝantoj. Antaŭ ni estas dua parto de nia vojaĝado – Nova Zelando, Franca Polinezio, Usono kaj Istanbulo. La libroj estas kun ni, do ni daŭrigas legadon.

Tahitio, Franca Polinezio, 1. 12. 2017



Sileziano kaj Montarano

## EROSO kaj PSIĤA (ΕΡΩΣ και ΨΥΧΗ)

## Spiros Sarafian, el Grekujo

**S**e mi povus elekti la dion kies favoron kaj protekton mi dezirus, sen dua penso mi kurus en la brakumon de Afrodita (Αφροδίτη). Kial? pro mil kialoj, precipe ĉar ŝi estas la plej bela diino, sekve la plej bela estaĵo aperinta en la mondo, krome ĉar ŝi estas ne nur la diino de la belo, sed ankaŭ la diino de la amo kaj amoro. Ŝi estas tiu, kiu vekas al dioj kaj homoj la amdezion, kiu ekpuŝas la seksimpulson kaj la sola kiu scias kaj povas instrui perfekte la amorarton!



Tamen, ni lasu nun miajn proprajn preferojn kaj la talentojn de Afrodita, cetere iam, en alia eseo, ni devas paroli ekskluzive pri tiu ĉi splenda diino.

Ni nun diros, ke Afrodita, same kiel la belegulinoj de ĉiuj epokoj, malgraŭ sia granda avantaĝo, estas ĵaluza kaj enviema, precipe kontraŭ aliaj belaj virinoj.

Nu, en tiu tre antikva, praa epoko, en kiu mi obstine restas, iu eksterordinare bela mortemulino estis Psiĥa (en la helena lingvo «animo»), la plej juna filino de iu reĝo. La famo pri la granda beleco de Psiĥa etendiĝis ne nur en ŝian loĝlokon, sed multe pli foren, tiel, ke la homoj komencis kredi, ke la junulino estas personigo de Afrodita, eble la diino mem. Tial, miloj da homoj vizitadis la loĝlokon de Psiĥa kaj amasiĝis ĉirkaŭ la palaco de ŝia patro, esperante ke ili povos de proksime vidi kaj kliniĝi antaŭ ŝi.

Pro tio la lokaj sanktejoj kaj temploj dediĉitaj al la

adorado de Afrodita restis dezertaj, afero kiu kaŭzis la indignon de la diino.

Psiĥa, sciante nenion pri tio kion senvole kaŭzis, estis malfeliĉa pro alia kialo, ĉar, malgraŭ tio, ke ŝia patro klopodadis trovi inter la plej noblaj junuloj de la reĝlando taŭgan edzon por ŝi, tio ne estis ebla, ĉar la junuloj, opiniante ke io stranga okazas rilate al la bela reĝidino, timis kaj evitis la edziĝon. Tiele, Psiĥa restis sola kaj malĝoja.

Afrodita, dume, tre kolera kontraŭ Psiĥa, ordonis al sia filo, Eroso (Ερως) ĵeti sian sagon sur la junulinon, tiel, ke ŝi arde enamiĝu al la unua nekonata vira estaĵo kiun ŝi renkontus. Ŝi faris tion ĉar ŝi estis preparinta dolan planon. Fakte, la patro de Psiĥa, vidante ke ne estis al li eble edzinigi sian filinon, petis konsilon de la divenejo de Apolono (Απόλλων). Post interveno de Afrodita, estis donita al la reĝo stranga dia ordono, ke li konduku kaj lasu sian filinon sur tre dezerta kaj kruda monta loko. Tie estis la restadejo de terura monstro, kaj laŭ la plano de Afrodita, tiu monstro estus la unua vira estaĵo kiun Psiĥa ekvidus kaj al kiu ŝi certe enamiĝus.

La reĝo, ne povante kontraŭstari al la dia postulo, kun granda malĝojo kondukis kaj lasis sian filinon sur tiu monto. Tamen, Eroso, dezirante kontroli ĉu la volo de lia patrino bone efektiviĝis, iris la unua al la difinita loko, kaj -jen la antinomio de la afero- la dio de la amo, ekvidinte Psiĥan, kvazaŭ fulme trafita de siaj propraj sagoj, eksentis flamantan amon kaj ardan amordezion al la belega junulino. Li tuj forflugis, tamen en tiu ununura momento, Psiĥa, kun miro, ekvidis la belan, junan dion, la unuan nekonatan al ŝi viran estaĵon, kaj laŭ la dia plano estis, same fulme, enamiĝinta al li.

La afero komplikiĝis, neatenditaj implikoj -dolĉaj, tamen implikoj- konfuzis Eroson, kiu, por kaŝi sian malobeon, kaj ne perdi sian amanton, petis la





helpo de la dio Zefiro (Ζέφυρος), la okcidenta vento, kiu volonte alflugis, levis la junulinon kaj, milde blovante, kondukis kaj lasis ŝin en mirinda ĝardeno, kiu ĉirkaŭis belegan tutoran palacon.

Tie, Psiĥa vivis kaŝite, tute sola, ĝuante la plej bonan prizorgadon de nevideblaj servistinoj, kiuj kontentigis ĉiujn ŝiajn bezonojn kaj dezirojn. Ĉiun nokton, en tute malluma dormoĉambro, Eroso, soifante amorplezuron, vizitis sian amanton. La reciproka flamanta amo, la ardaĵoj, kisoj, kuntuŝo de la junulaj korpoj, la kuniĝo kaj feliĉo de la geamantoj daŭris la tutan nokton, ĉar, antaŭ la alveno de la unua lumo, antaŭ la matena krepusko, Eroso foriris, li malaperis en la mallumon kaj Psiĥa restis denove sola. Tio okazis, ĉar Eroso, ne sciante ke la junulino estis ekvidinta lin sur la monto, estis metinta la severan kondiĉon, laŭ kiu Psiĥa devis neniam vidi lian vizaĝon, ĉar se tio okazus, li estus devigita tute kaj por ĉiam malaperi.

Tamen, kiom da virinoj povus obei tian sensencan malpermeson? Psiĥa eltenis longe, tamen, iam, ŝia virina naturo venkis la saĝajn hezitojn, kaj, unu nokton, kiam Eroso endormiĝis, ŝi faris la fatalan movon, ŝi ekbruligis la kandelon!

Tio signalis la katastrofon, ĉar Eroso tuj vekiĝis kaj dirinte nek vorton malaperis en la noktan mallumon. La malfeliĉa Psiĥa, kiu nenion sciis pri Afrodita kaj pri ties venĝo, kaj kiu nur tiun solan luman momenton ŝi ekkonsciis ke sia amoranto estas dio, enfalis en neelteneblan malesperon. Ŝi vane atendis, ŝia amanto ne revenis, do, movite de neestingebla amdeziro, de animdoloro, de despero, ŝi aŭdacis eliri kaj komencis senĉese vagadi ĉien, serĉante sian amanton. Tio estis la plej granda eraro, ĉar, Afrodita, informiĝinte pri la ekapero de la perdita Psiĥa, tuj trovis, kaptis kaj enŝlosis ŝin en sia palaco, kie senindulge ŝi truddevigis ŝin senĉese, penige laboradi kiel la plej

mizera sklavino, suferante samtempe vipbatadon kaj severajn turmentojn.

Tamen, Eroso ne plu povis vivi sen Psiĥa. Se li ne estus dio ni dirus ke li faris superhomajn klopodojn –do, li faris klopodojn superdiajn- por moderigi sian aspiradon, por regi super sia amordeziro, super sia pasio, tamen lia dieco ne sufiĉis, li ne povis elradigi el sia menso kaj animo sian ardan amon al Psiĥa. Jen, do, alia paradokso, la dio de la amo estis venkita de sia propra arto! Nu, kiam li ne povis plu elteni tian doloran amsuferadon, li trovis la kuraĝon, li iris ĉe sia kolerega patrino, li plendis, protestis, petis, petegis, postulis, minacis, li faris ĉion kion li povis por konvinki ŝin cedi, lasi Psiĥan libera, eĉ permesi ties kuniĝon kun li. Tamen, ĉia klopodo pruviĝis vana, ĉar la ofendita diino, obstine rezistadis. Tiam, Eroso sin turnis al la ceteraj grandaj dioj kaj post ties petoj kaj post la interveno de la direĝo Zeŭso (Ζεὺς), Afrodita finfine konvinkiĝis, ŝi cedis, ĉio finiĝis!

La geamorantoj tute libere kuniĝis, eĉ la reĝo de la dioj mem benis la brilan nupton, en kiu ĉeestis ĉiuj dioj, duondioj, kaj ĉiaspecaj diaĵoj.

Nu, fine la amo, ankoraŭfoje venkis ĉion, ĉiuj baroj falis, la feliĉo kronis la geamantojn kaj post nelonge venis en la mondon la filino de la benplena paro, al kiu estis donita la nomo Hedona (Ἥδονή), vorto, kiu en la helena lingvo signifas “volupto”. Do, de Eroso kaj Psiĥa estis naskita Hedona, alivorte, de eroto kaj animo elvenis la volupto, kaj ĉio tio ĉi estas benita de la dioj!

Ĉu unu ankoraŭ amhistorio kun feliĉa fino? Eble nur tio, eble io pli profunda; notinde, ke pri aferoj en kiuj enmiksiĝas tiom da diaj kaj homaj pasioj, oni nenion povas diri kun certeco!

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo





## La instruisto

**L**a instruisto estas vivulo iranta per du piedoj. Li estas trovebla sur ĉiuj kontinentoj, precipe kie estas lernejo, pli precize lernantoj.

Naturesploristoj observis, ke tie, kie ariĝas 25 ĝis 30 lernantoj, post iom da tempo aperos ankaŭ instruisto.

La instruisto nutras sin precipe per grasita pano kaj legomaĵo, anstataŭ gratenitaj kokidaĵoj kaj ansera hepataĵo. Laŭ opinio de naturesploristoj, la instruisto estas utila estaĵo, malgraŭ tio ke li ne donas lakton, nek metas ovojn, sed anstataŭ ĉio ĉi, li donas klasifikaĵojn. Laŭ opinio de aliaj – kvazaŭ ili estus pli multaj – la instruisto estas tute malutila estaĵo. La formikece diligentaj homoj laboras kaj produktas, dum la instruisto subtenas sin per la socio, kaj ne hontas peti monon pro tio, ke li parolas al muroj tra horoj, kriaĉas ĉiuminute al la lernantoj kaj poluas per kretopolvo la medion jam tre poluitan. Kompreneble estas vere, ke la instruisto ne puŝas ĉarumon, ne pelas ĉevalon, ne gisas sonorilegon, ne faras sapon (krom brandon eble, se li povas distili el io).

La plimultiĝo de la instruistoj okazas en universitatoj kaj altlernejoj. Okaze de superplimultiĝo, la instruistoj trovas postenon nur post plursemajna serĉado en vilaĝo situanta malantaŭ la dorso de Dio. Kiam mankas instruistoj, oni ĉasas ilin per kaptomaŝo, kutime sensukcese.

La instruisto ĝenerale portadas kompleton, escepte kiam oni ne povas plu nomi ĝin kompleto pro eluziteco. Liaj malsanoj pli-malpli identas kun tiuj de la lernantoj, de kiuj li ricevas ilin senpage kaj senimposte.

Krome, li malsaniĝas je vejnoj pro multa starado, je hemoroido pro sidado kaj je stultiĝo plurfoja pro malkomprenemo de siaj lernantoj.

La instruistoj kutime laboras tage, nokte ili malofte aperas ĉe siaj kaŝejoj. Ilia ŝatata kutimo estas la instruado, sed krom tio ili ŝtelnis kaj imitas ĉiujn

## sendis Lenke Szász, el Hungario

farojn de la homoj.

La instruisto, samkiel la urso, malŝatas la vintron. Prefere li tradormus la tutan vintron kaj tiamaniere li solvus plej praktike la problemon de la hejtado kaj de la hispana gripo.

La instruisto estas malproksima parenco de la simio, sed li ne tro fieras pri tio, kaj kiam lernantoj rememorigas lin pri tio, li furioziĝas.

La instruistoj dividiĝas en plurajn subspeciojn. Tiel ni povas paroli pri instruisto pri matematiko, plej facile rekonebla, se oni petas lin adicii du numerojn triciferajn. Tiu, kiu ne sukcesas dum 5 minutoj, tutcerte li instruas matematikon. Krome troviĝas instruistoj pri lingvoj. Ili estas duspecaj: instruistoj pri la gepatra lingvo kaj instruistoj pri fremdaj lingvoj. La diferenco inter ili estas tio, ke la unuaj parolas la lingvon kiun ili instruas, la lastaj nur instruas la aliajn. Kaj jen instruisto pri sportoj, kiu klopodas instrui al lernantoj la sportojn. Tio sukcesas malfacile, ĉar la lernantoj konas la malnovan veron, ke sporton scias vere nur la sportisto mem. Kiu ne kapablas plu sporti, sed ankoraŭ povas ekspliki kiel oni devus fari, tiu estas instruisto pri sporto. Ni povas paroli ankaŭ pri instruisto pri fiziko. Li estas rekonebla, ĉar evidentas, ke la „pomo de Newton” estis falinta sur lian kapon. Ekzistas instruisto pri biologio, kiu konfuzas miriapodon kaj zipon. Kaj estas instruisto pri historio, kiu uzas metodojn el ŝtonepoko en la instruado, ktp...

Oni ekstermas instruistojn per pensiigo. Kompreneble, ili povas forpasi eĉ pli frue, sed nur kiam okazas al ili io eksterordinare malbona, kiun elteni eĉ instruistoj ne povas.

de **János Fleisz** (1951-)

tradukis **Lenke Szász**, el Hungario



## Via nomo flugas en la aero

**M**i memoras min mem en unu malgranda boato sen remiloj, kuŝanta en ĝi sen miaj sensoj dumnokte sur la akvoj de silenta lago. Miaj pensoj estis moviĝantaj samtempe al tri malsimilaj direktoj, sed eble mi tion, tiel imagis. Tamen, antaŭ miaj fermitaj okuloj estis flugantaj strangaj numeroj, ili ŝajne estis dancantaj super mia vizaĝo. La 111111 estis sur la 777777 kaj poste aperis la 6666 kun la 9999999. Tiuj frenezaj numeroj eble neniam haltus la dancadon se la malgranda boato ne kolizius sur unu malgrandan rokon. En la sama momento haltis ankaŭ mia kapdoloro. Mi volis malfermi miajn okulojn, sed ili

ne malfermiĝis, ĉar mi ne havis la forton. Mi eble timis, ke se mi ilin malfermus, tiam miaj okuloj revidus la frenezajn numerojn, kaj mi tion tute ne volis. Mi volis resti en trakvileco eĉ sen miaj sensoj en ĉi tiu malgranda boato sen remiloj.

Subite unu forta fulmo instigis min malfermi miajn okulojn kaj mi iel retrovis miajn sensojn. Tiam mi vidis ne la numerojn sed fumon, tre malproksime sur tero. La boato estis glitanta malrapide al la direkto de la fumo. Post duono da horo mi vidis ĉe la bordo de la



## sendis Koros Levos, el Grekujo





lago ne nur la fumon sed ankaŭ unu grandegan fajron.

Mi lasis mian manon fali en la akvon. La akvo ne estis tro malvarma. Mi turnis mian korpon kaj klopodis vidi la fundon de la lago. Sed tiam la luno kaŝiĝis sub nigraj nuboj. Ŝajne mi devus pli atendi, mi devus pli atenti. Tiam mi aŭdis sonojn. Sonoj de homoj, de ĉevaloj, de hundoj. Sed kune kun tiuj sonoj venis al mi la belaj odoroj de fruktoj. Eble proksime al la bordo de la lago estis arbaro de fruktoarboj.

Mi eble estis en la boato dum pli ol du tagoj, sen akvo, sen sensoj, sed kune kun multaj numeraj figuroj super mia kapo. Mi opiniis ke la kavaliroj kaj la soldatoj ĉe la bordo jam vidis min ĉar la hundoj nun bojis pli laŭte kaj la kavaliroj tuj eniris kun siaj fortaj ĉevaloj en la akvon de la malprofunda lago al la direkto de mi. Mi nur memoras ke mi klopodis kaŝi miajn gravajn paperojn kiam atingis mian boaton unu granda hundo, mi aŭdis henojn kaj sentis baton sur mia kapo kaj ĉio ĉi finiĝis.

Sed ne ! Nenio finiĝis ankoraŭ. Mi volis levi miajn manojn sed ne sciis kial. La belaj sonoj, la belegaj birdkantoj komencis eniri mian koron. Mi ne estis certa se mi estis sonĝanta, kaj kial estis pasantaj antaŭ de miaj fermitaj okuloj ĉiuj ĉi bildoj el miaj infanaj jaroj. Mi vere ne sciis se mi estis vivanta aŭ ne. Sed la delikataj odoroj de la frukto-arbaro ŝajne atestis ke mi estis viva.

Mi, tiel, sen sensoj restis dum longa tempo sed ne sciis dum kiom da horoj. Kvazaŭ tiu mallumo neniam forirus. Nun teruraj bildoj komencis kuri en mia menso. Silkaj ŝtofoj flugis en la nokto kaj sub la arĝent-kolora lumo de la luno rampis unu paro de geamantaj serpentoj. Iliaj erotikaj kisoj haltigis la laŭtajn voĉojn de la soldatoj, kiuj fakte estis ridantaj laŭte, sed pro kio, mi ne sciis. Mi nun sentis min soifa. Mi volis movi miajn manojn sed io malhelpis ilin. Mi sentis varman ruĝan koloron sur miaj okuloj. Finfine mi malfermis ilin sed eble estus pli bone se mi restus sen miaj sensoj

kaj flugi kune kun la silkaj ŝtofoj.

Mi estis kaptito! Mi estis ligita sur arbo proksime al fajro ĉirkaŭ kies estis la ĉevaloj de la kavaliroj. Ŝajne ili estis atendantaj ion, do ili neniun atenton donis al mi. Nur unu hundo estis bojanta al mi, sed ĝi poste enuis kaj foriris. Ĝi ne vidis la testudeton kiu pasis malrapide tre proksime de mi.

Silente sed maltrankvile tri fraŭlinoj eliris de granda tendo. Videblaj nur per la grandaj okuloj de ranoj, en la granda tendo, kvar helpistinoj vestis la nudan reĝon kiu iom poste eliris kaj sursaltis sur sian blankan ĉevalon, kiu havis la nomon de lia dua edzino. La nomon de lia dua amanta forpasinta edzino. Li post la morto de ŝi ĉiutage iom post iom freneziĝis kaj nur milito feliĉigis lin. Li antaŭe estis tre sana homo. Lia unua edzino mortis en la aĝo de 16 pro malsano. Li tiam estis 14 jaraĝa sed post dek jarojn li trovis la veran feliĉon kun la dua edzino. Li tiam estis 24 jaraĝa kaj ŝi estis 22.

La aspekto de la reĝo estis trista. Eble li restus tiel por ĉiam. Mi opiniis, ke eĉ se pluvus la reĝo restus seka. Dio multaj fojoj klopodis helpi lin, sed li rifuzis fiere-freneze. Kelfoje pluveroj falis sur li kiel konsolaj de Dio, sed li preskaŭ ĉiam fermis siajn orelojn kaj okulojn kaj la pluveroj vane forvaporiĝis.

Estis jaŭde, kiam lia proksima sekretario kun helpo de la fratino de la reĝo rapidiĝis al lia oficejo portante unu leteron sendita de la amanto de lia edzino. Sed tiu ĉi leteron fakte skribis la sekretario. Tamen laŭ la reĝo, ĝi ne povus estis malvera letero, ĉar en ĝi estis tiel ekzakta kaj detala priskribo de la psikologio de sia edzino. Estis jaŭde, kiam la reĝo mortigis sian duan amatan edzinon. Jam pasis 10 jaroj. Li vivis feliĉe dum 20 jarojn kun ŝi kaj li nun estas 54 jaraĝa, kaj similas al luphundo. Li neniam ridis kaj li neniam ridos. Li ĉiam serĉas la amanton de sia edzino. Eble nun sia edzino aŭ la animo de ŝi vidas lin, eble ŝi ploras por li, eble ŝi estas unu el la ranoj kun grandaj okuloj ekster lia tendo, eble estis tiu ĉi testudeto kiu pasis malrapide apud mi, eble ŝi venis al li kiel, tiuj pluveroj. Sed li nenion komprenis. Same, kiel li nenion komprenis pri la malvera letero skribita per sia sekretario kun helpo de lia fratino.

La lunlumo brilis sur la spado de la reĝo. La spado ŝajne estis lumanta. La reĝo estis rajdanta sur sia ĉevalo sed ŝajnis maltrankvila. Li opiniis ke li finfine trovis la perfidan amanton de sia edzino. Li denove rigardis al la grandan fajron ĉe la bordo de la lago.

“Akvo... akvo...” mi vokis mallaŭte. Unu soldato aŭdis min, lasis sian lokon apud la fajro kaj alproksimiĝis min. Li vidis la ŝnuron kun kiu mi estis ligita kaj haltis. Iliaj ŝildoj estis kuŝantaj surteren proksime al la fajro, kie ankaŭ estis lia ĉevalo. Sed mi

estis tiom malforta, ke eĉ se mi ne estus ligita, mi ne havus la forton b atali kun li por ŝteli la ĉevalon kaj forrajdi. Tiel mi restis silente sed nur dum unu momento mi sukcesis diri “mi soifas... akvon...” La soldato tranĉis unu frukton kiun li plukis el la fruktoarbo sur mi kun sia tranĉilo kaj metis la pecon en mia buŝo. Mi kiel sovaĝa besto formanĝis ĝin. Mi dum unu momento estis beata, sed nur dum unu malgranda momento.

Subite io ekbrilis, tamen tio ne estis la luno sed la spado de la reĝo. Lia blanka ĉevalo haltis antaŭ mi. Li obstine rigardis al mi. La soldatoj tuj haltis la babiladon kaj ridadon. La reĝo pluiris al la direkto de la fajro. La soldatoj alproksimiĝis min. La reĝo tute ne vidis ilin, li estis nun rigardanta al la grandan fajron ĉe la bordo de la lago.

Tiam ĉiuj kavaliroj surĉevaliĝis kaj pretiĝis por batalo. Sed la reĝo alproksimiĝis la fajron. Li haltis. Deĉevaliĝis, karesante la kolharojn de sia amata ĉevalo. Liaj okuloj estis rigradantaj daŭre la grandan fajron. Liaj pensoj, lia koro estis ie malproksime, nur lia korpo, kiu estis staranta fiere, troviĝis ĉi tie. En siaj ruĝaj lupaj okuloj li nun estis spektanta sian unuan edziĝceremonion, tiam, kiam li estis 6 jaraĝa. Tiam li estis tute pura infano, senkulpa, tiel, kiel anĝelo. Li sentis la fortan odoron de la fruktoj venanta el la proksima frukt-arbaro. Li rigardis la fajron kaj li malrapide promenis al la direkto de la lago kaj li eniris en la akvon de la malprofunda lago. En lia kapo trakuris pensoj kaj memoroj. Dum ses monatoj li estis for de sia palaco kaj estis vivanta en tendo. Li dum ses monatoj movis kune kun la soldatoj kaj siaj fidelaj kavaliroj. Li ĉiujn estis suspektanta kiel perfiduloj.

Li subite forlasis siajn pensojn, turnis sin al mi, kaj marŝis rapide al la direkto de mi. Sen mia kompreno lia buŝo troviĝis apud mia orelo kaj li kriis “Ĉu vi ankaŭ estas.....?” Mi antaŭ ol li finis sian frazon kriis “Mi ne estas perfidulo, mi estas unu a.....” Sed ĉifoje antaŭ ol mi finis mian respondon li denove kriis apud mia orelo “Do, kion vi faras ĉi tie?” Mi respondis: “Mi estis iranta al la proksima vilaĝo por vidi mian amikinson.” Liaj okuloj ruĝiĝis eĉ pli. Li levis sian manon al la soldatoj je kio du el ili tuj alvenis. Unu batis min en la ventro, la alia serĉis miajn poŝojn kaj trovis la paperojn mi kaŝis dum en la boato. Ili estis miaj reĝaj dokumentoj, kiuj montris, kiu mi estis. Sed ili tute ne donis signifon al tiuj paperoj kaj ĵetis ilin al la fajro. Ili estis serĉantaj ion alian, do ili trovis mian poŝkajeron en kiu mi kutimis skribi miajn pensojn, ideojn, poemojn, notojn pri la interesaj lokoj mi vizitis ktp. Ili plue trovis unu leteron, kiun mi ankoraŭ ne finis. Ĝi estis por mia amikino. La reĝo dum unu momento restis senmova, sed li poste kaptis la leteron per sia maldekstra mano, kaj per la

alia kaptis stangon kaj iris al la fajro. Li tie bruligis unu finon de la stango por lumigi kaj pli klare legi tion, kion mi estis skribinta en la letero.

Lia mieno, liaj okuloj... La reĝo en tiu ĉi momento tute ne similis al normala homo, sed sub la arĝentkolora lumo de la luno li ŝajnis al freneza luphundo. En lia brusto estis unu bela ornamaĵo plej eble el sukceso, donaco de lia dua amata edzino. Li neniam eliris sen tiu ornamaĵo. Iam lia edzino estis utila kiel pluvo, ŝia rido malfermis la petalojn de floroj, kiam ŝi kantis la birdoj haltis la pepadon, ŝi similis al unu bela nubo.

Mi preskaŭ svenus pro la bato. Mi vespiris. La reĝo turnis sian kapon kaj rigardis al mi. El liaj okuloj mi certiĝis, ke li volis mian sangon. Kun la stango li bruligis mian nefinitan leteron. Mi tute ne komprenis kial li faris tion, eble mi neniam komprenos, eble mia amikino havis la saman nomon kun lia edzino. La reĝo lasis la leteron fali el sia mano. La letero daŭris bruli kaj tiam subite la aero flugigis ĝin alte super la lagon.

La kavaliroj estis pretaj buĉi min. Mi spite al ĉio volis vekri sed ne faris tion kaj silentis. Mi rigardis al la direkto de la koto por la grandokulaj ranoj, kiuj eble kompatas min. Mi por unu momento pensis ke mi ankaŭ sentis la samon por la reĝo. Mi tute ne volus esti en lia pozicio, dormanta dum la tago, kaj en la nokto sub la lunlumo kiel luphundo serĉante perfidulojn, kiuj fakte ne ekzistas. Li estis konfuzita, sklavo de siaj sovaĝaj malveraj pensoj. Mi sentis bedaŭron por li. Eble en kelkaj minutoj mia sufero finiĝus sed li restus por ĉiam kun tia frenezeco.

Per la ordono de la reĝo, kune kun la malvarma venteto, mi vidis, ke la kavaliroj estis alproksimiĝantaj al mi. Mi preskaŭ perdis miajn sentojn. Ĉio ĉi tute ne havis sencon. Ĉu tiu estus mia Fatalo?

Jen burdo, jen la buntaj koloroj, jen mia amika testudo.... ĉiuj ĉi moviĝis rapide kaj pli rapide en mia kapo. Tio, kion mi sole memoras estis la krioj de la reĝo “Buĉu lin! Ne lasu lin foriri!”

Jen unu densa nubo kiu kovris min, jen unu



pluvero, jen mia longa spiro. Sed mi ne komprenis kien kaj kiel ĉiuj subite malaperis. Mi troviĝis kuŝanta en malgranda boato sen remiloj, sur silenta lago. Tagiĝas. Sed ne ! mi ne sonĝis ĉion ĉi. Jen io brulanta sur la aero, la letero al mia amikino, kiun bruligis la reĝo. Ĝi flugas an la aero super

la boato, super mia kapo kaj ĝi ankoraŭ brulas. Nur unu peco de ĝi saviĝis el la fajro. Estas nur unu vorto sur ĝi. Jes mi povas legi tion, kio estas skribita sur ĝi. Ĝi estas via nomo.

Via nomo flugas en la aero....

verkis **Koros Levos**, el Grekujo

## UEA-interveno ĉe UN en Ĝenevo dum la 10-a Forumo pri Minoritatoj, la 30-an de novembro 2017. Parolo de Stefano Keller.

### **nkluziva edukado kaj partopreno de minoritataj junuloj en la publika vivo**

Sinjoro Prezidanto, Sinjoro Speciala Raportisto, karaj reprezentantoj de minoritatoj naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj, karaj partoprenantoj, saluton!

Mi nomiĝas Stefano Keller, kun miaj kolegoj ĉi-ĉeestaj mi reprezentas Universalan Esperanto-Asocion (UEA), la mondan organizaĵon de la parolantoj de Esperanto, la lingvo internacia. Male ol aliaj lingvoj, Esperanto ne povas havi imperialistajn tendencojn kaj havas nenian ligan kun intereso ekonomiaj aŭ politikaj. Ĝi estas ties lingvo, kiu ĝin elektas, kaj ĝi kreas lingvan egalecon en la komunikado inter la popoloj.

Universala Esperanto-Asocio, defendas la lingvajn rajtojn de ĉiuj minoritatoj kaj de ĉiuj indiĝenaj popoloj, jam ekde pli ol jarcento.

Preskaŭ ĉiuj intervenintoj menciis la mankon de eblo por la junuloj de minoritatoj, ricevi edukadon en ilia gepatra lingvo.

La rajto al edukado en la gepatra lingvo estas fundamenta rajto, ĉar en nia gepatra lingvo ni

komencas malkovri la mondon, komuniki kun la aliaj. En sia gepatra lingvo kapablas ĉiu el ni plej bone lerni, havi edukadon atingante bonajn rezultojn.

Nia asocio forte subtenas la klopodojn strebantaj al tiu celo.

Ni ŝatus ankaŭ rememorigi pri tio, ke la lernado de Esperanto estas elstara bazo por, krom la gepatra lingvo, lerni pli facile aliajn lingvojn kaj tiel subtenas la malfermiĝon al la respekto de aliaj popoloj.

Rekomendoj:

Karaj partoprenantoj, membroj de minoritatoj kaj decidantoj, ni forte rekomendas al vi studi kaj uzi la Gvidilon pri la realigo de lingvaj rajtoj de lingvaj minoritatoj.

*Dankon pro via atento, kaj apartan dankon al la interpretistoj voĉaj kaj al iliaj kolegoj, interpretantaj en gestolingvo, por ilia laboro tre grava! Dankon!*



## Ŝercoj



La aviadilo flugas super Napolo. La stevardino klarigas al la pasaĝeroj:  
— Ni flugas super Napolo. Tutcerte vi konas la proverbon "Vidi Napolon kaj poste morti", ĉu ne? Do kontemplu bone la urbon nun, ĉar niaj du motoroj ĵus paneis.

\* \* \*

Viro tre timas de la fantomoj. Malgraŭ tio en iu nokto li devas iri tra tombejo. Li paŝadas singardeme kaj neatendite li aŭdas bruon. Li rimarkas ĉe iu tombo iu ĉizas la tomboŝtonon.

— Ho, Dio mia! Mi jam preskaŭ mortotimiĝis. Kion vi faras ĉi tie meze de la nokto?

— Oni misskribis mian nomon kaj mi korektas ĝin.

\* \* \*

Du amikoj babiladas:

— Amiko, imagu, mi sonĝis, ke mi estas skolto.

Denove mi estis malgranda infano.

— Kaj mi sonĝis, ke mi estis kun du belegaj virinoj.

— Friponulo, kial vi silentis pri tio?

— Ĉar via panjo diris, ke vi estis en skolta tendaro inter

la montoj.





## Krucvortenigmo



### Horizontale

1. Esperanto Revuo publikigita en Kaliningrado Rusio; (inverse) Parto de urbo, orname provizita per grandaj gazonoj, arboj, floroj ktp.
2. Eventuale, en ebla okazo; Rilata al la landoj kiuj kuŝas inter la du latitudaj paraleloj, kiuj kuŝas je 23°27' norde kaj sude de la ekvatoro.
3. (inverse) Birda sterkaĵ', precipe tiu de maraj birdoj; (inverse) Rilata aŭ apartenanta al virseksa estaĵo; Muskola kava organ', kiu per siaj kontrahiĝoj pumpas la sangon tra la korpo.
4. Flinto de eligi ŝviton tra la poroj de la haŭto; Protein' de la vivuloj, kiu katalizas biokemiajn reakciojn; Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj objektoj.
5. Difinebla ide', bazita sur elementoj de sciado; Pez' de ĉia entenantaĵo en kiu estas enpakita ia varo aŭ kemiaĵo.
6. Ne sensperceptebla forto, rigardata kiel la esenco kaj la ekspliko de la vivo de ĉiu ekzistaĵo; Ĉefurbo, en la antikveco, de la Imperio, en la nuntempo, de Italio.
7. Ĉirkaŭa ekstrema parto de la surfaco de objekto, rigardata laŭ ĝia longeco; (inverse) Ĝermana vira nom', i.a. de imperiestro (795—855), nepo de Karolo la Granda.
8. Toskania rivero, trafluanta i.a. Florencon kaj Pizon; Simbolo de elemento kun atomnumero 18; (inverse) Nom' de H<sub>3</sub>AuO<sub>3</sub> aŭ H<sub>Au</sub>O<sub>2</sub>.
9. Sufikso prezentanta la plenumanton de procezo dum ties plenumiĝo; (inverse) Tio, kio karakterizas ion aŭ iun.

## Reprezentanto de Turkio por UMEA

Nia faka asocio **UMEA**, "**Universala Medicina Esperanto-Asocio**", serĉas membrojn kaj Lokan Delegiton en Turkio.

Informojn donas nia retpaĝaro


<http://umea.fontoj.net>

Nia retadreso estas [umea@uea.org](mailto:umea@uea.org)

**D-ro Christoph Klawe**

Prezidanto

**Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA)**



10. Tio, kio premokupas la psikon aŭ trude ekkaptas la atenton; Virina nomo kaj unu el la velŝipoj de Kolumbo.

### Vertikale

1. Nomo de Sankt-Peterburgo de 1924 ĝis 1991.
2. Estro de vivejo de la plej malnovaj monaĥaj ordenoj; Mezurunu' por kampoj en la metra sistemo kaj valoranta 100 m<sup>2</sup>, simbolo: a.
3. (inverse) Revuo de SAT.
4. (inverse) Kromosoma element', heredaĵer', kiu regas la sintezon de polipeptido kaj sekve partoprenas en la regado de la ĉel-funkciado; Digno.
5. Sufikso esprimanta naskiton, infanon, filon ktp; Sufikso esprimanta ĝenerale agon.
6. Revuo de FEL; Membro de grupo, de societo.
7. Spec' de tropika, unujara, pli-malpli marĉa herbo; (inverse) Aro de tri aferoj aŭ personoj.
8. Globet' ĝenerale kalcita, granda kiel fiŝovo, formiĝinta ĉirkaŭ minerala aŭ organika ero.
9. Senvokala kapo; Vetku' 42,2 km distanca.
10. Aperitiv' konsistanta el sep okonoj da blanka vino kun unu okono da kasiso; Turniĝ' ĉirkaŭ interna akso.
11. Plurjara herb' kun horizontala rizomo, klingoformaj folioj, mallarĝa spadiko kaj foliforma spato; Glaĉera deponaĵ', konsistanta el amaso de tre diversgrandaj eroj.
12. Alegoria rakonteto, uzata por komuniki religiajn aŭ moralajn veraĵojn.

(la solvo troviĝas en la lasta paĝo)

## Mallonga Historio de Filozofio (23)




**Saluton,**

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun filozofo Hegel

**Vasil Kadifeli**

**Arthur Schopenhauer (1788-1860)**

### **M**omentaj rigardoj al realeco



“Vivo estas plena je doloroj, eble estus pli bone ke oni ne naskiĝu.” Jes, tiel pensis Schopenhauer. Laŭ li, ni ĉiam volas ion, kaj penas akiri tion, poste ni volas ion alian, kaj vivo daŭre rondiras tiel ĝis nia morto. Oni pensas, ke oni feliĉigos se oni atingos iun

celon, sed feliĉo estas ankaŭ portempa. Kvankam li pensis tiel, lia filozofio ne estas tiom deprimanta. Li pensis, ke se homo povus kompreni la naturon de la vera realeco, tiam homo povus forigi la malbonajn aspektojn de sia naturo. Ŝajnas, ke liaj pensoj estis proksimaj al tiuj de Budho ĉar li ankaŭ legis multon pri la orienta filozofio. Budho diris ke ne estas io kiel “mi”, se ni povas forgi tiun penson de “mi” tial ni atingos klarecon kaj lumon.

Schopenhauer estis iomete deprimita, malfacila kaj aroganta homo. Li instruis en la sama universitato kun Hegel (vidu TS #24) en Berlino, kaj li volis, ke siaj klasoj estu en la sama horo kun tiuj de Hegel. Tamen la studentoj ŝatis Hegelon, kaj li ne estis tiom ŝatata instuisto, do liaj klasoj restis malplenaj. Li poste forlasis universitaton.


Li publikigis sian libro “La mondo kiel Volo kaj Ideo” en la jaro 1818 sed li longe laboris sur ĝi kaj republikigis pli longan versin en 1844. La vortoj Volo kaj Ideo estas skribitaj kun majusklo ĉar ili havas plian signifon ol tiuj, kiujn ni komprenas. La ideo en lia libro estas simpla : “realeco havas du aspektojn, kaj volo kaj ideo (aŭ dezajno). Volo estas blinda sed mova forto kiu ekzistas ĉie en la naturo. Sed ideo aŭ dezajno estas kiel ni komprenas kaj perceptas la mondon tra niaj spertoj. La mondo estas konstruita imago en nia cerbo, plej eble same al la “fenomena mondo” de Kant (vidu TS #21). Nia cerbo desegnas la mondon laŭ niaj sensoj kaj perceptoj. Ni tra tiu desegnado taksas la diversajn aspektojn de la mondo kaj donas al ili signifojn. Sed li ankaŭ kiel Kant pensis, ke estas ia pli profunda realeco malantaŭ tiu mondo

de aspektoj. Kant parolis pri “noumeno/noumena” kaj kvankam li tion ne eksplikis, por li realeco havis pli ol unu version kaj estis neatingebla. Sed Schopenhauer pensis, ke ne povas esti pli ol unu “noumeno” ĉar tiam ni devus dividi tempon kaj spacon, do li priskribis tiun mondon kiel unikan, unuiĝintan, sendirektan forton kaj ĝin eble ni povas observi dummomente tra niaj agoj kaj eble arto. La “Volo” en lia teorio estas iomete malsimila ol tiu, kiun ni komprenas. Ĝi estas sencela blinda volo. Ĝi estas la energio en la naturaj fenomenoj. Laŭ li ne ekzistas Dio kiu donas direkton al tiu Volo, nek tiu Volo estas la Dio mem. Kaj kiel realeco, ankaŭ homo estas parto de tiu sensignifa volo.

Tamen estas kelkaj spertoj kiuj faras vivon elteneblan. Multaj el ili venas el arto. Arto provizas haltejon por deteni nin el tiu senĉesa rondirado de vivo (la daŭra volo kaj penado atingi ion). Eble la plej sukcesa branĉo de arto por tio estas muziko ĉar laŭ Schopenhauer ĝi estas la kopio de la granda “Volo” kaj pro tio muziko tiel multe impresas nin. Aŭskultante bonan muzikon oni ne nur emocie impresiĝas sed ankaŭ vidas la realecon dummomente. Neniu alia filozofo krom Schopenhauer tiel adoris arton en sia teorio. Pro tio artistoj, verkistoj kaj ĉefe muzikistoj ŝatas la ideojn de Schopenhauer kaj ili estas multe impresitaj de li.

Schopenhauer ne nur priskribis la realecon kaj niajn rilatojn kun ĝi, sed li ankaŭ priskribis kiel oni devas vivi. Ni ĉiuj estas partoj de tiu ununura energio kaj individuoj vivas en tiu mondo kiel desegnaĵoj. Do ni devas agordi niajn kondutojn. Malhelpi la vivon de aliaj homoj, fakte malhelpas nian vivon kaj tiu estas la esenco de lia etiko. Se mi mortigas onin, tiam mi mortigas parton de la viva energio. Ĝuste tiel, kiel serpento mordas kaj manĝas sian voston. Laŭ lia etika filozofio la aliaj homoj ne estas ekstere de mi ĉar ni ĉiuj estas partoj de la sama Volo kaj Mondo.

Alia sugesto de li estis forlasi ĉion kaj vivi kiel asketo, por ke oni evitu la tentiĝon pri deziro al vivaj aferoj. La saman vojon ankaŭ instruas multaj religioj ĉefe tiuj de oriento. Tamen Schopenhauer ne vivis tian vivion kaj li ĝuis sian vivon ĝis fine. Oni dirus, ke li estis hipokrito, aliaj dirus ke pro tia deprimita filozofio li devus memortigi sin.



(daŭrigota)

## EL LA UNUA PARTO - TAŬO

### 34

La granda TAŬO estas inundanta;  
ĝi povas estis dekstre aŭ maldekstre.  
Ĉiuj aĵoj dankas al ĝi sian ekziston,  
kaj ĝi ne rifuzas ilin.  
Se la laboro estas plenumita,  
ĝi ne nomas ĝin sia posedo.  
Ĝi vestas kaj nutras ĉiujn aĵojn  
kaj ne pretendas esti ilia mastro.  
Ĉar ĝi eterne nepretendemas,  
oni povas nomi ĝin malgranda.  
Ĉar ĉiuj aĵoj dependas de ĝi,  
eĉ sen koni ĝin kiel mastron,  
oni povas nomi ĝin granda.  
Tiel agas ankaŭ la saĝulo:  
La saĝulo neniam faras sin granda;  
tial la saĝulo plenumas sian grandan laboron.  
Tial la saĝulo plenumas sian grandan verkon.

#### Rimarkoj de Cezar

TAŬO estas tio, kio ĉion kuntenas, eĉ la tutan universon, sen bezoni eĉ nur unu komandovorton! Sed kvankam ni ne vidas ĝin, ni povas ĝin senti kaj eĉ ekkompreni, se ni pretas por tio. Tio estas vere mistera, ĉu ne? Zamenhof faris el tiu sentata TAŬO kvazaŭ dion, la grandan nekonatan estaĵon, kiu gvidas nian sorton. Kaj ankaŭ el la filozofio de Laocio fariĝis religio, sed mi pensas tamen, ke Laocio mem tion tute ne celis. Li ne volis, ke ni preĝu al iu standardo, por povi sekvi al tio, kio ĉion harmonie kuntenas.

#### Vilhelmo:

"Se la laboro estas plenumita,  
ĝi ne nomas ĝin sia posedo."

Tiuj du linioj sonas kiel ĝermo de Marks-penso: "La privata posedo faris nin tiel stultaj kaj unuflankaj, ke aĵo estas nur nia, se ni havas ĝin, do, se ĝi ekzistas kiel nia kapitalo aŭ se ni ĝin senpere posedas, manĝas, trinkas, je nia korpo portas, en ĝi loĝas ktp., koncize, ĝin uzas. Kvankam la privata posedo ĉiujn ĉi senperajn efektivigojn de la posedo mem rigardas nur kiel 'vivrimedojn' kaj la vivo, al kiu servas la vivrimedoj, estas la vivo de l' privata posedo, do laboro kaj kapitaligo."

Kaj efektive, posedopensado, estas nur tre limigita pensado, rilate al TAŬO. La pensoj de Laocio estas certe pli parencaj al aŭtentika komunismo ol al iu kapitalismo.

### 35

Kiu firmitenas la grandan prabildon,  
al tiu venas la mondo.  
Ĝi venas kaj ne estas vundata,

en kvieto, egaleco kaj beateco.



Muziko kaj logaĵo:

Ili certe haltigas la migranton sur lia vojo.

TAŬO eliras el la buŝo,  
milde kaj sen gusto.

Vi rigardas al ĝi kaj ne vidas ion nekutiman.

Vi aŭskultas al ĝi, kaj ne aŭdas ion nekutiman.

Vi agas laŭ ĝi kaj ne trovas finon.

#### Rimarkoj de Cezar

Interesa kaj grava estas ofte tio, kio tute ne trovas atenton. Ĉar ĝi ne estas pompa, ne brila, ne multekosta, ne riĉa, ne atentofrapa.... Sed kio estus la mondo ekzemple sen la tiom ofte malŝatataj laboristoj kaj kamparanoj, kio sen la aŭfaleco de homoj, sen rideto de infanoj? Aŭ sen blovfloretoj sur herbejoj, kiuj memorigas nin pri tio, ke ni estas pli ol nur laborantaj maŝinoj. Kaj tamen eĉ tio, kio kuntenas ĉion, apenaŭ trovas atenton en nia hastiga tempo. La kreskado de la grenkampoj, por doni ekzemplon, estas grandioza afero, sed ĝi okazas tute mallaŭte.

#### Rimarko de Anniespera

"Tute kiel la aero, ĉu ne? Sen aero ni ne povas vivi, tamen ĝin ni ne vidas, nek aŭskultas."

(daŭrigota)

## Esperanto-Kulturdomo Gresillon

Esperanto-programo en kastelo Greziljono:  
[gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo)

**2018-apr-20/28:** PRINTEmpaS, intensivaj kursoj  
kaj internaciaj KER-ekzamenoj: [gresillon.org/p](http://gresillon.org/p)

**2018-maj-09/13:** Korusa renkonto de Interkant':  
[gresillon.org/koruso](http://gresillon.org/koruso)

2018-maj-09/13: ReVe, Renkontiĝo Vegana:  
[gresillon.org/reve](http://gresillon.org/reve)

**2018-jul-09/27:** Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj

**2018-jul-09/16:** Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso: [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)


**2018-jul-16/21:** Turisma semajno kaj Esperanto-kurso: [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

**2018-jul-21/27:** Internacia E-Konferenco de OSIEK  
« Esperanto en Artoj »: [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)

**2018-aŭg-11/19:** Festa Semajno  
por infanoj kaj familioj,  
[gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)







(16)

“Ĉi tiu estos facila,” diris al si Rikardo, enirante ne tre grandan magazenon, porsemajne fermitan “pro subita forpaso de la estro”, laŭ skribaĵo fiksita sur la pordo.

Sed apenaŭ li estas en ĝi, jam lin ekkaptas nova timo. Ŝajnas, ke io

bruas, kaj tiuj bruoj strange similas tiujn, kiujn li mem faris, kiam li estis enŝlosita. Ne ekzistas tiom da malsamaj manieroj alvoki helpon!

Ŝranko. Muroŝranko, fakte. Jes, el ĝi la batbruo venas. Ĝi slosilo troviĝas en la ŝrankopordo. Kun koro batanta, Rikardo malŝlosas, malfermas kaj vidas viron, kies korpo ne povas moviĝi pro tre serioze farita ligado: la manoj estas fiksitaj unu al la alia ĉe la dorso, kaj ankaŭ la malsupran parton de la kruroj oni ligis. Tuko sur la buŝo malebligas parolon, kaj, mirige, mankas al la viro pantalonon.

La aero, kiu trafas la nazon de la knabo, tiel aĉe malpuras, ke lia unua movo estas forturni sin. Nur per tre malfacila kunpreno de la tutaj troveblaj kuraĝo kaj volforto li sukcesas reveni al la viro kaj liberigi lin.

Kiam tiu ekparolas, lia voĉo plenas je kolero:

“Pli ol dudek kvar horojn! Ĉu vi povas imagi? Pli ol dudek kvar horojn mi restis en tiu lokaĉo. Sen manĝi, sen trinki, sen povi iri necesejen. Fi! Mi fermu la pordon. Pri la purigo ni aranĝos poste. Iru al la fenestreto tien, bonvolu, kaj envenigu iom da pura aero. Elteni tian malpurecon mi ne plu povas. Kaj nun trinki,” li aldonas, kaj li iras preni por si grandan glason da biero.

Rikardo estis tiel trafita de la neatendita trovo, ke li

nur rigardegas plu, senvorte, kun la malfermita buŝo, kiun li kutime elmontras, kiam timo aŭ nekomprene forprenas de li ĉian kapablon funkcii.

“Ki... ki... kio o... okazis al vi?” li fine sukcesas elparoli.

“La teroristo atakis min. Tiu, kies foto malbeligas ĉiun straton de ĉi tiu urbaĉo. Mi apenaŭ vidis lin, sed tamen sufiĉe por lin rekoni. Sed tuj mi estis senkonsciigita. Mi vekigis ligite kaj enŝlosite, sen pantalonon.”

“Tion mi komprenas eĉ malpli ol la ceteron. Kial diable igi vin senpantolona?”

“Uniformon li volis. Li prenis ankaŭ la jakon. Li ial bezonis mian uniformon de Sekuriks-gardisto.”

“Ĉu ankaŭ vi estas Sekuriks-ano? Nekredeble!”

“Kion vi trovas nekredebla? Mi ne estas malpli taŭga por tiu belaĉa funkcio ol vi, knabeto! Aŭ ĉu vi trovas min fi-garda, ĉar mi lasis ilin superforti min?”

“Ne, ne, mi...” komencis Rikardo, time, ĉar tiu viro estis alta, larĝa kaj dika fortegulo, kiun kolero igis eĉ pli danĝera. Sed li ne havis la tempon fini, jam la alia interrompe parolis:

“Ne kredu min pli fuŝa ol vi. Via nuna sinteno ne vidigas vin alte kapabla gardisto. Vi staras tie kiel ulo, kies pensilo ĉesis funkcii.”

“Mi trovas en vi nenion malbonan. Kaj mi ne dubas, ke mi estas ĉiurilate malpli kapabla ol vi. Ne. Vi min miskomprenis. Kiam mi uzis la vorton nekredebla, mi simple volis diri, ke mi ne facile komprenas, kial nia firmao lasis vin en tiu ŝranko sen zorgi pri vi dum pli ol dudek kvar horoj.”

(daŭrigota)

Vintra Vento

sendis Elena Popova, el Bulgario

Vintra vento  
infan ‘petolema,  
emas fajfi  
preter la arboj.

冬の風は  
いたずら小僧  
フィーフィー笛吹き  
木の間を通る

Hodiaŭ ĝi grimpis  
sur la pintojn  
kaj ilin ornamis  
per neĝaj steletoj.

今日は登るよ  
木々のてっぺん  
きらきら輝く  
雪の星

Kun la arboj por ludi  
alvenis la vento,  
sed ne komprenis  
ilian silenton.

遊びたくて  
風は来るが  
木々はが黙って  
立っている

Dormas la arboj  
fortojn akumulas,  
dum blankaj revoj  
sonĝe luliĝas.



木々は眠るよ  
力をためて  
白い願いが  
ゆりかごの中

la poemon verkis  
**Elena Popova**, el Bulgario  
al japana lingvo tradukis  
**Hori Jasuo**, el Japanio

**L**a 19an de oktobro, la Pan-STARRS 1 teleskopo en Havajo faris rimarkindan observon. Objekto kiu unue aspektis kiel rapida kometo ne sekvis kutiman vojon kaj iris multe tro rapide. La konkludo ne estis malfacila. Ne temis pri kutima kometo aŭ asteroido, sed pri objekto de ekster nia sunsistemo. Por sciencistoj ĉie surtere tio estis granda surprizo kaj ĝi tuj iĝis la unua prioritato por la plej grandaj teleskopoj. Oni devis studi ĝin kiel eble plej multe, ĉar la objekto ne restus longe. Tamen, kion faras tia objekto en nia sunsistemo kaj kiel ĝi iris ĉi tien?



Kutime neniu granda objekto eniras aŭ eliras la sunsistemon, pro tio ke steloj havas tiom da maso. Objektoj kun grandaj masoj havas fortan gravitan kampon kaj tiel tiras planedojn kaj alian materion pli proksimen. Kio preventas objektojn de fali en la stelon estas iliaj rapidecoj. Pro tio ke la planedoj iras flanken tre rapide, ilia pozicio rilate al la stelo ŝanĝiĝas kaj la direkto laŭ kiu la gravito tiras konstante moviĝas. Tiel la planedo restas en fermita rondvojo kiun oni nomas orbito. Kutime orbitoj estas elipsoj kun la Suno en unu el la fokuso. Per ŝanĝi la rapidecon per kiu oni iras flanken, oni povas streĉi tiun elipson ĝis oni iras tiom rapide ke oni povas eskapi la graviton de la Suno. Tiam la orbito ne plu havas la formon de elipso, sed de parabolo.



La plej rapidaj objektoj en nia sunsistemo estas kometoj. Tio igus ilin taŭgaj kandidatoj por eskapi la graviton de la Suno. Unue ankaŭ nia gasto estis konsiderata kometo, ĝis aldonaj esploroj pruvis la malon. La objekto ne havis voston kiam ĝi proksimis al la Suno, kvankam kometoj estas famaj pro iliaj vosto


de vaporiĝanta materio. Aldone, la objekto plej verŝajne konsistas el peza materio kiel metaloj kaj ŝtono. Alie ĝi neniel povus elteni rondiri ĉiujn sep horojn. Kontraste, kometoj estas mapli pezaj objektoj, kiuj konsistas grandparte el glacio.

Ke la gasto ne estas kometo eble igas ĝin malpli spektinda, sed estis granda novaĵo por sciencistoj. La objekto plej verŝajne estis asteroido kiu formiĝis kiam nova sunsistemo naskiĝis. En tiu fazo, la tuta sistemo estas ĥaosa kaj junaj planedoj kaj rokoj ankoraŭ ne havas stabilajn orbitojn. Ili trafas unu la alian kaj ĵetas unu la alian gravite, ĝis nur kelkaj restas. La miliardoj da jaroj poste relative malmulte ŝanĝiĝas. Sciencistoj pensas ke la interago inter nia gasto kaj la gravito de sufiĉe granda objekto donis tiom da energio kaj rapideco al ĝi, ke ĝi eliris la sistemon. Poste ĝi vagadis dum epokoj tra malplena spaco.



Kiam la asteroido kaptiĝis de la gravito de la Suno, ĝi eniris ordo al la planeda ebena. Ĝi do ne influigis de la gravito de la grandaj planedoj survoje. Post trairi la ebenon, ĝia orbito kurbiĝis sub la Sunon, post kio ĝi denove trairis la planedan ebenon laŭ multe malpli akra angulo. Kvankam la asteroido ja interagis kun la Suno, la rapideco de la asteroido estas tro granda por resti en la sunsistemo. Je ĝia periapso (plej proksima punkto al la Suno), ĝi pli proksimis al la Suno ol Merkuro, la unua planedo de la Suno. La objekto venis el la direkto de la stelo Vego, sed ĝi ne formiĝis ĉirkaŭ tiu stelo. La asteroido simple tiom longe vojaĝis, ke la steloj intertempe multe moviĝis.

La objekto ricevis nomon en la Havaja, nome 'Oumuamua, kio signifas pli-malpli "mesaĝanto de for unue alvenanta". Tiu nomo estas tre taŭga, ĉar la asteroido estas la unua konata objekto kiu forlasis alian sunsistemon kaj poste eniris la nian. Tio igas la objekton la unua membro de tute nova astronomia



kategorio kun propra nomsistemo. Laŭ la aŭtoritato de la Internacia Astronomia Unio (IAU) la permanenta kodo por la objekto estas 1I/2017 U1 kun la "I" de "interstela".

Oni observis la asteroidon multmaniere kaj ni sendube lernos multe pli kiam la datumoj haveblas, sed ni jam havas sufiĉe bonan bildon de 'Oumuamua. Ni kalkulis la orbiton per kompari la poziciojn de la objekto dum malsamaj momentoj kaj observis kiom la lumo ĝi elbrilis. Tio estas la ŝlosilo al ĝia rotacio kaj materialo, sed ankaŭ ĝia formo. Per periodaj ŝanĝiĝoj de la heleco de la asteroido, sciencistoj sukcesis studi kiom rapide ĝi rotacias kaj kiel antaŭe dirite ke ĝi ne

povas konsisti el malfortaj materialoj. Aldoni, ĝi povas multe diri pri la formo de la objekto, pro tio ke unu flanko elbrilas multe pli da lumo ol la alia. Oni pensas ke tio estas pro ĝia ŝtreĉita, cigara formo. La estimo estas ke ĝi estas ĉirkaŭ 400m longa kaj nur kelkaj dekmetroj larĝa. Finfine laŭ lumo indikas ke la koloro de la objekto estas ruĝeca.

Nia interstela gasto montras kial ni ne nur rigardu specifajn celojn, sed esploru la tutan ĉielon. Oni neniam scias kion oni trovos. Ĝi ankaŭ montras kiom gravaj ŝancoj estas en astronomio kaj scienco ĝenerale. 'Oumuamua certe ne estas la lasta interstela objekto kiun ni trovos kaj eble ĉi tiaj renkontiĝoj estas multe pli oftaj ol ni pensas. Kio ja estas pruvita estas ke ni povas ankoraŭ lerni multe de objektoj kiel 'Oumuamua, pri la universo kaj nia pozicio en ĝi. Ni do prenu tiujn ŝancojn, ĝis ni mem povas viziti niajn najbarojn.

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2017/12/06/interstela-gasto/>

## Centjara Naskiĝfesto de Marcel Leereveld

**S**abate la 2-an de Decembro dek ses esperantistoj kuniĝis kun multaj familianoj kaj amikoj de Marcel ĉe la Tecoma Uniting Church por helpi celebri lian centan naskiĝdatrevenon. Kelkaj venis de aliaj ŝtatoj, kaj kelkaj kiuj ne povis korpe ĉeesti venis "spirite" per Skajpo por doni bondezirojn al Marcel. Estis multe da manĝaĵo kaj muziko kaj estis tre ĝuebla aŭdi pri Marcel en la paroladoj de homoj kiuj konas lin pro diversaj kialoj.

**"Gratulojn kaj Bondezirojn al nia eminenta Patro/ Patrono de Esperanto en Aŭstralio, Marcel Leereveld. La vivo daŭru esti por vi ĉiutaga beno.**

Vera Payne."

## el Aŭstralio Esperantisto, #351



**TURKA STELO ankaŭ gratulas kaj bondeziras sanon kaj feliĉon al tiu eminenta esperantisto.**



**103-a Universala Kongreso de Esperanto**  
**Lisbono, Portugalio, 28 julio – 4 aŭgusto 2018**



### Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe  
 Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.  
 Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.  
 Retadreso: kongresoj@co.uea.org. TTT: <http://www.uea.org/kongresoj>.

### Kongresa Temo

La temo de la 103-a UK estas: "Kulturoj, lingvoj,  
 tutmondiĝo: Kien nun?"

### Informoj

Por aliĝoj kaj mendoj servas la ĝenerala kongresa  
 retejo de UEA (vd. supre). En Facebook estas evento-  
 paĝo kun diskutejo kaj informoj pri la kongreso,  
 aldonataj laŭ la evoluo de la preparlaboroj: <https://www.facebook.com/events/629033787272431>.

### Kongresejo

La kongresejo estos en la ĉambroj de la Fakultato pri  
 Juro kaj de la Rektorejo de la Universitato de Lisbono,  
 Alameda da Universidade, Lisbono.

### Vojaĝado


Lisbono estas konektita kun la cetera Eŭropo kaj la  
 mondo pere de la plej renomaj flugkompanioj. La ĉefa  
 en la lisbona flughaveno estas TAP Air Portugal.  
 Krome, du el la plej konataj eŭropaj flugkompanioj kun  
 aparte malmultekostaj tarifoj, easyJet kaj Ryanair,  
 flugas inter Lisbono kaj kvardeko da urboj tra la  
 kontinento. El la flughaveno (LIS) eblas iri al la  
 kongresejo taksie, buse, metroe... kaj piede, ĉar la  
 distanco inter ambaŭ lokoj estas nur 3 kilometroj.  
 Lisbono estas facile atingebla ankaŭ buse kaj trajne.

### Loĝado

Detalaj informoj aperos en la Dua Bulteno. La oferto  
 varias de modestaj dormlokoj ĝis luksaj hotelĉambroj,  
 kelkaj je piedira distanco de la kongresejo; aliaj estos  
 facile atingeblaj per la publikaj busoj kaj metroo.

### Ekskursoj

La ekskursoj vizitos la ĉefajn vizitindajn lokojn en  
 Lisbono kaj proksimaj urboj, ekzemple la lokajn  
 palacojn, Kastelon de Sankta Georgo, la tradician  
 kvartalon Alfama, Turon de Belém, Monaĥejon de la  
 Ĵeromoj, muzeojn, Bairro Alto (Alta Kvartalo), la  
 kvartalon Chiado, Pilgrimejon de Fátima k.a. La antaŭ-  
 kaj postkongresaj ekskursoj estas planataj por la  
 Insularo Madejro kaj Acoroj, por la suda parto de la  
 lando, ĉe Algarvo, por la centra kaj norda partoj de la  
 lando al i.a. la urboj Koimbro, Porto, Guimarães.  
 Detalaj priskriboj aperos en la Dua Bulteno.



### Internacia Kongresa Universitato

La 71-a sesio de IKU akceptas prelegproponojn ĝis la  
 31-a de januaro 2018. La prelegoj prefere rilatu al la  
 Kongresa Temo. Pliajn informojn vidu en la paĝo 233.

### Reklamiloj

La Unua Bulteno estas senpage havebla ĉe UEA,  
 ankaŭ grandkvante.

### Aliĝilo

Papera aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe  
 UEA, kiu volonte liveros ĝin grandkvante por  
 distribuado kun E-gazetoj kaj en E-aranĝoj. La retan  
 aliĝilon eblas ankaŭ elŝuti ĉe la kongresa TTT-ejo aŭ  
 uzi ĝin tie.

### Kotizoj


Ĝis la 31-a de decembro 2017 validas jenaj kotizoj  
 (interkrampe tiuj por la landoj de tarifo B): Individua  
 Membro de UEA (sed ne MG) € 180,00 (135,00); MG-  
 membro aŭ ne-IM de UEA € 225,00 (170,00);  
 Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo IM de UEA €  
 90,00 (65,00); Kunulo/junulo/handikapulo ne-IM de  
 UEA € 135,00 (100,00). Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj  
 post la 31-a de decembro 1997 aliĝas senpage (bv.  
 kunsendi kopion de lia/ŝia identigilo). Pagmanieroj  
 troviĝas en la aliĝilo, Jarlibro 2017 (p.45-46) kaj en la  
 TTT-ejo.

Fonto: [http://revuoesperanto.org/unua\\_komunikado](http://revuoesperanto.org/unua_komunikado)

**A**ntaŭ multaj jarcentoj, la virinoj en Jiangyong de la provinco Hunan kaj ĝiaj apudaj regionoj kreis esoteran skribsistemon por sia ekskluziva uzo.

Ĝiaj romboidaj kaj maldikaj strekoj estigis la kromnomon longkruraj aŭ formikaj skribsignoj. Kiel la sola rezervo de la virinoj de Jiangyong kaj apudaj gubernioj, ĝi estis tute nedeĉifrebla por viroj, tial kleruloj nomis ĝin Nü Shu, aŭ la virina lingvo.

Pro la manko de registroj aŭ originalaj ekzemploj de tiu ĉi skriba lingvo, estas malfacile determini, kiam ĝi komencis evoluon, sed estas certe, ke ĝi estas la unika konata genro-specifa lingvo en la mondo. Do, kiel atendite, la virina lingvo estis inkluzivita en la unua parto de naciaj nemateriaj kulturaj heredaĵoj en 2006.



### La Spirita Mondo de Virinoj

La skribo uzata en vilaĝoj laŭlonge de la rivero Xiaoshui en la urbeto Shangjiangxu de la gubernio Jiangyong, ne nur aludas la skribsignojn kaj skribitajn verkojn en tiu ĉi lingvo, sed ankaŭ inkluzivas ĉantadon kaj kantadon de tiuj verkoj. Eĉ en ĉi tiu malgranda enklavo, kie la lingvo evoluis kaj estis populara, ne ĉiuj virinoj majstris en ĝi, sed nur unu aŭ du el ĉiu deko.

Literaturaj verkoj en tiu lingvo estis kutime en sep-signaj versoj, kiuj esprimis la amarecon de la vivo de la aŭtoroj. Virinoj akiris skribilojn el ĉiutagaj aferoj, uzante bastonetojn kiel plumojn, fulgon por inko, kaj skribante sur tolo, kruda papero, paperaj ventumiloj aŭ silkaj poŝtukoj.

La verkoj havas diversajn temojn. La plej kreemaj estas la Tri-tagaj Libro kaj Artikoloj de Ĵurligitaj Fratinoj, kaj la lastaj estas atestoj de eterna amikeco inter virinoj. Iuj verkoj registris la tekstojn de popolkantoj, baladoj kaj funebraj kantoj ĉanditaj en entombigaj kaj oferaj ceremonioj. Aliaj estas adaptaĵoj de popularaj literaturaj verkoj. Tiuj virinoj legis kaj ĉantis siajn verkojn por sin distri, kiam ili kolektiĝis por fari kudradon.

La virinoj verkis plejparte pri siaj ĉiutagaj vivoj anstataŭ fari sociajn komentariojn. Malsame ol aliaj popolkantoj, tre malmultaj el iliaj verkoj rilatis al kreado de mitoj. Ili prefere absorbiĝis en multaj personaj

aferoj de geedzeco kaj familia vivo, amo, anekdotoj, popolkantoj kaj enigmoj.

Pro la diktatoreco de la reganta patriarka socio, virinoj ĝenerale ne vizitis lernejojn. Ili restis hejme por teni familion orda. La kudraj kunvenoj, en kiuj la virinoj en Jiangyong kolektiĝis por kanti kaj instrui la lingvon unu al alia, estis tre valoraj ŝancoj por renkontiĝo kaj interŝanĝo de internaj pensoj. Publikaj aktivecoj, kiel ekzemple funebraj kaj oferaj ceremonioj kaj teatraĵoj, estis ĉefaj fontoj de ilia krea inspiro.

La virina lingvo estis transdonita de patrinoj al filinoj dum multaj jaroj. Tiu eksterordinara skribo ebligis al needukitaj kaj analfabetaj kamparaj virinoj alimaniere registri siajn pensojn kaj verki rakontojn. Krome, la kreivo, kiun ili inspiris unu al alia, formis dumvivan ligilon inter tiuj virinoj. Ili kreis la verkojn kun la intenco esti dividitaj kaj kantataj kun samspecaj fratinoj anstataŭ esti privataj taglibroj.

### Kantotekstoj

La virina lingvo estis publike kantata kaj ĉandata, tial la juna generacio de virinoj lernis kaj transdonis ĝin buŝe.

Esploristoj rekonis fiksjajn melodiojn en la skriba lingvo de la dinastio Song. Ili estas en la tri bazaj gamoj de alta, meza kaj malalta pitĉoj. La ripeto de simplaj melodioj kaj gamoj donis al la kantoj puran kaj primitivan kvaliton. La virina lingvo fonetike registris la lokan dialekton en Jiangyong, tial la melodioj nature komunikas ĝiajn sep tonojn en specifaj rimoj.

La funkcio kaj valoro de la virina lingvo evidentiĝis en geedziĝaj festoj, foiroj kaj aliaj popolaj aktivecoj. En Jiangyong estis la tradicio okazigi tranoktan kunvenon de kantado por fianĉino tuj antaŭ ŝia geedziĝo tago. La ejo por la okazaĵo, kutime la Halo de la Klano, estis ornamita per ruĝaj lanternoj tri tagojn antaŭ la geedziĝo, kaj sur tabloj estis amasigitaj dolĉaĵoj kaj lokaj bongustaĵoj. Amikinoj kaj inaj parencoj de la fianĉino estis invititaj al la kantado, kaj tiel ili adiaŭis ŝin. Virinoj kantis kaj legis rakontojn en la sia lingvo ĝis tagiĝo, ĝuante la lastajn horojn kun sia amikino antaŭ ŝia aliĝo al la familio de la venonta edzo. Tiuj antaŭgeedziĝaj celebroy estis fakte renkontiĝoj aranĝitaj speciale por baldaŭ edziniĝontaj fraŭlinoj, kvankam estis neniu fiksjta dato, en kiu ili okazis.

Profesoro Gong Zhebing el Wuhan-Universitato, unu el la kleruloj, kiuj malkovris tiun ĉi esoteran lingvon, konsideras la lokan dialekton kiel la socian grundon, kiu nutris la virinan lingvon. La konstruado de kamparaj lernejoj post la Revolucio de 1911 kaj la klopodo por elradikigo de analfabeteco post la fondiĝo



de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 ebligis al lokaj virinoj viziti lernejojn. Tie ili lernis legi kaj skribi la oficialan lingvon, Putonghua. La posta dekadenco de la virina lingvo estis unu el la multaj kulturaj oferoj al socia modernigo.

### Mistero por Esploro

Gong renkontis tiun ĉi skriban lingvon en 1982 dum sia ekskurso al Jiangyong. Li kaj aliaj kleruloj rigardis ĝin unue kiel kodon anstataŭ skriba lingvo. Post pli vasta esploro, Gong kaj lingvisto Yan Xuejiong, tiama vicprezidanto de la Sud-Centra Minzu-Universitato, kunverkis en 1983 artikolon pri analizo de la virina skribsistemo. La artikolo vekis grandan atenton en internaciaj sciencaj rondoj, post kiam ĝi estis publikigita en la 16a Internacia Ĉinotibeta Lingvistika Konferenco en Usono. Scienculoj el Usono, Japanio kaj Aŭstralio kaj enlandaj institucioj, kiel ekzemple Tsinghua Universitato kaj Sud-Centra Minzu-Universitato faris detalan esploron en la vilaĝoj de Jiangyong.

Inter legendoj rilataj al la originoj de la lingvo, la plej oftaj rakontas pri virinoj kreantaj la skribon laŭ la ŝablonoj broditaj sur la tuko teksita de ili mem dum kudraj kunvenoj. La virinoj estis ekskluditaj el lernejoj kaj ne havis ŝancon lerni oficialan lingvon, tial ili aŭdacis krei sian propran. Tiu rakonto konfirmas el alia vidpunkto, ke la virina lingvo rilatas al normaj ĉinaj ideogramoj.

Aliaj kleruloj apogas tiun teorion. Ili konstatis, ke la virina lingvo registras ĉinan dialekton per adapto de normaj ĉinaj ideogramoj. Tamen, tiu transformado estas arbitra, tial estas tre malfacile rilatigi la formigon de la virina lingvo kun normaj ĉinaj ideogramoj. Sed esploristoj konsentis pri tri niveloj de variado - strekoj, strukturo kaj formo. Pro la arbitreco de la skribo,

multaj skribsignoj havas malsamajn formojn. Tio malfaciligas al esploristoj akordiĝis pri ilia ĝusta nombro. Taksadoj varias inter 100 kaj 3 000 laŭ malsamaj materialoj kaj ordigaj kriterioj.

Kiel membro de la ĉina lingva familio, la virina lingvo estas distinga pro sia grafika fonetiko, laŭ kiu unu signo reprezentas grupon da homofonoj. Kontraste, la norma ĉina lingvo estas tipa ideografia lingvo. Ĉar la virina lingvo estis kutime brodita sur vestaĵoj aŭ tolaj zonoj, ĝiaj signoj montriĝas pli malgrandaj kaj kurbaj. Tiu stranga skribmaniero dotas la virinan lingvon per speciala statuso en la historio de la disvolviĝo de la lingvo.

La virina lingvo estas kultura fosilio, kies signifo ampleksas antropologion, etnologion, sociologion, lingvistikon, filologion, etnologion kaj arkeologion. Ĝi havas netakseblan valoron por esploristoj de la originoj de homaj lingvoj kaj civilizacioj kaj de virinaj kulturoj. Bedaŭrinde literaturaj verkoj en tiu lingvo pli aŭ malpli ne ekzistas. Ili, laŭ konvencio, estis bruligitaj aŭ enterigitaj kiel oferaĵoj, kiam iliaj aŭtoroj forpasis. Estis malofte, ke iu verkoj restis kiel legacoj al filinoj aŭ amikinoj por rememorigo al virinoj, kiuj kompilis verkojn en la virina lingvo.

Estas malmultaj historiaj registroj aŭ lokaj kronikoj, kiuj rilatas al la virina lingvo, aŭ mencio pri ĝi en geneologiaj registroj. Neniu tia verko estis trovita inter lokaj elfositaj relikvoj. La sola referenco al la lingvo estas kelkaj linioj en la Notoj de Esploro pri Gubernio de Hunan-provinco de Zeng Jiwu en 1931: "En ĉiu majo, virinoj el diversaj urbetoj kolektiĝas por bruligi incenson, fari omaĝon kaj kanti kun ventumiloj, sur kiuj estis skribitaj kantoj. La skribsignoj sur tiuj ventumiloj estas tiel malgrandaj kiel muŝokapo kaj similaj al la mongola skribo. Mi renkontis neniun viron en la gubernio, kiu povas legi tiun ĉi skribon." Pro manko de aliaj materialoj, en la scienca rondo estas neniun konsento pri la kreo kaj evoluo de tiu ĉi lingvo.

La lasta natura sukcedanto de la virina lingvo, Yang Huanyi, forpasis en la 20a de septembro 2004. Tiuj informitaj pri la ŝlosilo al tiu ĉi ekzota skribsistemo ne estas plu, tial multaj skribsignoj restos enigmaj por ĉiam.

Fonto: <http://esperanto.cri.cn/2521/2017/04/17/180s192653.htm>

## Monda Monunujo: La Stelo

**N**e eblus prezenti la monunuon stelo sen mallonge skizi la historion de Universala Ligo – la Esperanto-asocio, kiu lanĉis ĝin. En la plej mallumaj tagoj de dua mondmilito, la 14an de aprilo 1942, okaze de la 25a datreveno de la morto de L.L.

## el Momato Revuo

Zamenhof, grupo de nederlandaj esperantistoj sekrete kunvenis en privata domo en Hago por omaĝi la iniciatinton de Internacia Lingvo. La kunvenintoj, kiuj jam havis personajn spertojn pri la barbara tiraneco dum la germana okupado, volis kune fari ion



konkretan por ŝirmi la homaron de nova mondkatastrofo. La frukto de la diskutado estis la unuanima decido fondi, sub la nomo Universala Ligo (UL), tutmondan organizaĵon kun celo labori por la efektivigo de la originala programo de d-ro Zamenhof, unuigi la homaron per komuna lingvo.

La iniciatintoj sekrete varbis aliajn konatajn esperantistojn aliĝi al la nova organizaĵo, kiu jam ekzistis en la formo de Prepara Komitato por progresigi la ideojn, pripensi la organizajn principojn kaj aliajn detalojn de la estonta agado. La 1an de julio 1945 la Prepara Komitato publikigis alvokon al la tutmonda esperantistaro aliĝi al la Universala Ligo kaj subteni ĝin.

Inter la proponoj de la Prepara Komitato estis la transpreno de gazeto „La Praktiko” kaj estigo de tutmonda monsystemo. Oni iniciatis internacian monunuon stelo. Sekva konkreta paŝo estis la okazigo de unua ĝenerala kunveno de Universala Ligo la 16an de marto 1946 en Hago.

Jam antaŭ la unua Ĝenerala Kunveno la Ligo fieris pri 1294 membroj en diversaj landoj. La Kunveno adoptis Statuton de la Ligo, aprobis la transprenon de la gazeto „La Praktiko”, deklaris oficiale la uzon de Esperanto kiel komuna lingvo de UL por ĉiuj bezonoj kaj elektis subkomitaton por ellabori regulojn pri la uzo de stelo. La membrototizo de la Ligo estis fiksita esti unu „briko” por dumviva membreco, kaj la valoro de tiu „briko” esti egala al unu stelo. Baldaŭ poste oni anoncis, ke la valoro de stelo estu egala al la prezo de unu ordinara pano en Nederlando, kiu tiam kostis kvaronon de guldeno. Alia rezulto de la Ĝenerala Kunveno de UL estis la uzo de la slogano „Unu mondo – unu lingvo – unu mono.”

Atentinda estas la fakto, ke ankoraŭ tiel frue la Ligo fieris pri bankrilatoj en ses landoj (Belgio, Danio, Germanio, Italio, Svedio kaj Svislando) kaj pri tri apartaj bankrilatoj en Nederlando mem. Por ĉiuj ĉi kontoj la UL faris kontotenadon konforme al la koncernaj naciaj valutoj kaj en steloj. Krome ĝi nomis agentojn en dek kvar pliaj landoj, kiuj simile faris financajn raportojn surbaze de la stelo.

### **Konstantvalora monunuo**

El la arkivoj de UL evidentiĝas, ke la fona intenco estis bazi la novan socian ordon sur konstantvalora monunuo, ĉar nur tiel eblus montri al la cetera mondo la eviton de tiuj ekonomiaj premoj, kiuj kaŭzas konfliktojn inter popoloj. Sekve de tiu filozofio la Ligo adoptis kiel bazon por la stelo la prezon de ordinara pano en Nederlando, tiutempe egala al kvarono de guldeno. Por la kurzilatoj de la stelo en la ceteraj landoj oni simple prenis ilin el la kuranta kurzotabelo (1946) de la ĉefa (komerca) banko en Nederlando.



Kompreneble en tiuj fruaj tagoj, oni devis flankenlasi provizore aliajn paŝojn por starigo de aparta banko de la UL (kun tutmonda ĝiro-pagsistemo) kaj por eldono de moneroj kaj monbiletoj.


En tiu frua tempo (1945) la Ligo emisiis t.n. Premio-Kuponojn en valoro de unu stelo, ĉiuj kun valideco ĝis la fino 1950, (kun la celo sendube fari postajn emisiojn, ĉiun kun valideco de kvin jaroj). La UL proponis utiligon de la premio-kuponoj por pagi kotizojn kaj anoncojn, por pagi la kostojn de eldonaĵoj ktp. La kuponojn la ligo ricevis kiel premiojn pro varbo de novaj membroj aŭ post partopreno en konkursoj de la UL. Uzado de la premio-kuponoj floris, kaj baldaŭ estis ordinare (laŭ raportoj en La Praktiko) fari pagojn dum Universalaj Kongresoj per tiuj kuponoj.

Domaĝe, la bonaj intencoj de la fondintoj de la Universala Ligo doni al la stelo konstantan valoron, ne ricevis la bezonatan apogon flanke de la ekonomikistoj de la mondo. La prezo de pano en nederlandaj guldenoj konstante (kvankam malrapide) plialtiĝis, sed neniu persono aŭ instanco prenis la necesan decidon ŝanĝi la kurzon de stelo rilate la nederlandan guldenon. Tiu kurzo restis kvar steloj por guldeno kaj oni ĉiam uzis la aktualajn kurzojn de la bankoj por fiksi la valoroj de stelo en aliaj landoj. Krome, la bona intenco teni la kontojn de UL en steloj ĉesis funkcii eĉ en la Universala Ligo mem, kaj do neniu akiris la necesajn spertojn uzi la konstantvaloron monunuon. Ne mirigas la fakto, ke la stelo perdis sian renomon, kiun ĝi havis, kaj estiĝis simple kuriozaĵo de la esperantistoj.

### **Sonĝo realiĝis**

La membroj en la Ligo plimultiĝis, atingante preskaŭ 15 000 en la malfruaj kvindekaj jaroj. Kaj en 1959 unu el la sonĝoj de la iniciatintoj realiĝis: la Ligo emisiis stelo-monerojn en valoro de unu, kvin kaj dek steloj. Ili estis produktitaj respektive el bronzo, latuno kaj kupronikelo en la ŝtata monproduktejo de Nederlando laŭ mendo de la UL. Vendoj de la moneroj rapide redonis al la Ligo la investon. En 1965 eblis eldoni alian moneron, ĉi-foje el arĝento en valoro de dudek kvin steloj. Ĝi bone vendiĝis.

Sed la alia sonĝo de la fondintoj, ke la stelo restu konstantvalora, restis kvazaŭ forgesita, escepte de



nun tre aĝaj liganoj. Vera aktivado de la Ligo preskaŭ ĉesis, escepte de eldonado de gazeto La Praktiko. Ĝi ĉesis aperi en 1972, kiam ties redaktoro Andreo Cseh, kiu redaktis ĝin ekde 1946, demisiis pro malsano.

En 1974 kelkaj fidelaj anoj de la Ligo transprenis la taskon revivigi la asocion. La UL rekomencis

aktivadon por paco kune kun Monda Asocio de Mondfederalistoj kaj kun Universala Esperanto-Asocio. Dum du jaroj de tiu restarigita agado la plikuraĝigitaj funkciuloj diskutis la evoluon de la stelo, aparte por ties reenkondukiĝo kiel internacia monunujo. Post pluaj diskutoj oni revalutis la stelon, kiu ĝis tiam valoris kvaronon de guldeno, al duono de guldeno, kaj la ligiteco al la prezo de pano malaperis. Poste la Universala Ligo decidis stabiligi la valoron de stelo.

#### Akcepto de konstanta stelo-valoro

La signifo de stabila stelo-valoro konsistis en tio, ke ekde iu dato la aĉetpovo de stelo restu ĉiam la sama senkonsidere al inflacio. La elektita dato por tio estis 1a de januaro 1977.

Do, ekde tiam unu stelo egalas al duono de guldeno. Alivorte, la aĉetpovo de unu stelo estis egala la aĉetpovo de duono de guldeno. La aŭtoro enkondukis la esprimon, kurzo de la stelo rilate la guldenon, kaj vortumis ĝin tiel, ke unu guldeno egalu al du steloj. Lia kontribuo en tiuj diskutoj trovis lokon en artikolo, kiu aperis en broŝuro de Josef Hartl el Vieno. La temo de tiu verko estis propono fare de d-ro Hartl, enkonduki kaj utiligi konstantvaloran monunuon en la batalo kontraŭ la atenco de inflacio.

Kiel ofte okazas, la eventoj kuris samtempe kaj sen evidenta interdependeco. En la sama jaro 1976 la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) faris premon je Universala Ligo por revaluto de la stelo; novaj adeptoj transprenis gvidajn poziciojn en tiu Ligo, kiu retrovis forgesitan stokon de stelo-moneroj kaj samtempe komencis eldonadon de nova Bulteno; nederlanda monreformisto publikigis artikolon pri la netaŭgeco de la ordinaraj monistemoj de evoluantaj landoj; d-ro Hartl publikigis sian broŝuron pri konstantvalora monunujo.

#### Nova kasisto de Universala Ligo

Komence de la sekva jaro (1977) la aŭtoro estiĝis

kasisto de Universala Ligo. Kun granda entuziasmo, li zorge studis la bezonojn, implicitajn en stabilvaloreco de internacia monunujo, konsiderante la ĝistiaman historion de UL kaj stelo.

La ceteraj estraranoj de la Ligo, ĉefe s-ro C.M.N.T. Op 't Roodt kaj d-ro W.P. Roelofs, kun simila entuziasmo volis establi kiel eble plej frue la agmanierojn por teni la valoron de stelo konstanta kaj publikigi tiun konstaton en la Esperanto-movado. La ideo, ke la valoro de stelo restu konstanta, ne tuŝata de inflacio, komencis esti ĉefa diskuttemo en la ree ekaperinta Bulteno de Universala Ligo sub la redaktado de Op 't Roodt.

Evidentiĝis, ke la UL tiutempe havis bankrilatojn kun sep landoj, inkluzive de Nederlando, kaj sekve necesis preni decidojn pri la valoro de stelo en aliaj landoj. Ŝajnis logike esperi, ke la stabilvalora stelo havu la saman aĉetpovon en tiuj landoj, kaj resti neinflua de la inflacio, nek tuŝata de la kapricoj de la valutaj kurzoj, fiksataj de la komercaj bankoj.

Pro manko de science bazitaj informoj pri la efektivaj aĉetpovo de la naciaj monunuoj en diversaj landoj (laŭ la difino de d-ro Hartl), ne eblis fiksi tute fidindajn kurzojn de la stelo rilate la naciajn valutojn. Nur la kurzo de stelo rilate la nederlandan guldenon ne bezonis diskuton. Sed la diskutoj pri la aliaj kurzoj de stelo estis komplikaj.

Precipe d-ro Roelofs volis atribui al la stelo iun karakteron, kiu estis tute fremda al la ideo de d-ro Hartl, kaj intencis samtempe uzi tiun monunuon kiel bazon de sia monreformisma propagando. Li volis utiligi la stelon kiel fundamento de interŝanĝoj financaj inter diversaj landoj, sed neniel rilati kun komercaj bankoj, kiuj por li estas abomenindaĵoj. Detaloj de la sistemo neniam estis klare priskribitaj al la aŭtoro, supozeble pro tio, ke al monreformistoj ties detaloj estas bone konataj. La aŭtoro volis, ke la stelo havu rolon konforme al la originala celo de Universala Ligo, kvankam agnoskante la relative arbitran bazon de la atribuitaj komencaj aĉetpovo.

Eĉ post monatoj de diskutado neniel eblis trovi kompromison inter la du kontraŭaj pozicioj. Tamen d-ro Roelofs akiris subtenon de la plimulto inter la anoj de tiama Estraro de la Ligo. Pro morala neebleco subteni tiun decidon, tute kontraŭan al la originalaj esperoj de la pioniroj, la aŭtoro estiĝis el ĉiuj funkcioj en la UL. La organizaĵo eniris denove dormantan staton. De tempo al tempo d-ro Roelofs en la Bulteno anoncis novajn ciferojn kiel „oficialan” valoron de stelo, sed neniam estis publikigita la metodo, nek la kalkuloj, sur kiu li bazis sian formulon.

#### Ne-oficiala stelo

La bazaj ideoj de d-ro Josef Hartl tamen ne mortis.



Ankoraŭ antaŭ la forlaso de Universala Ligo la aŭtoro estis komencinta uzi la stelon kiel bazon de kontotenado en la entrepreno Mondkomerca

Eldonejo Esperantista, en kiu la aŭtoro kune kun sia edzino estis proprietuloj. Post la retiriĝo li provis sekvi la kurzkonsilojn de UL, laŭ la formulo de d-ro Roelofs, sed tre baldaŭ eksuspektis, ke preciza utiligo de tiuj konsiloj kondukus al eraroj, el la vidpunkto de aĉetpovo de la stelo. Ekde la mezo de 1980 la aŭtoro komencis kolekti statistikajn donitaĵojn pri la inflacio ne nur en Nederlando, sed ankaŭ en pluraj aliaj landoj.

Li baldaŭ sukcesis fari komparojn por konstati la aĉetpovon de la (ne plu oficiala) stelo en la ĉi-supre menciitaj landoj, uzante kiel elirpunkton la arbitrajn komparojn de la unua tago de 1977, kiam laŭdifine la stelo akiris konstantan valoron. La unua malkovro estis, ke la formulo de UL certe kondukus al eraroj rilate Nederlandon. La aŭtoro eksuspektis sen ebleco pruvi tion, ke ĝi kondukus al eraroj ankaŭ koncerne aliajn landojn.

La evoluo de aferoj plirapidiĝis, kiam ekde la mezo de 1981 la aŭtoro komencis sciigi elektitajn kunlaborantojn pri la kurzoj en naŭ landoj, koncerne al kiuj li povis pli malpli fidi siajn kalkulojn pro la ebleco akiri la donitaĵojn sufiĉe frue kaj regule. (Baldaŭ montriĝis, tamen, ke la donitaĵoj pri Italio ĉesis veni regule, kaj li devis rezigni pri kurzo rilate tiun landon.)

La aferoj akceliĝis post aĉeto de (laŭ hodiaŭaj normoj tre primitiva!) komputilo. Do, en septembro 1982 eblis verki komputilprogramon por tre rapide kalkuli, prognozante la kurzojn de stelo koncerne la naciajn valutojn de diversaj landoj. Ekde tiam la aŭtoro eldonis gazeton kun la titolo Informkajero pri la stelo, kiu estis sendata al pluraj entuziasmaj kunlaborantoj pere de la valora helpo de Esperanto-Centro en Danio.

#### **Uzeblecoj de la stelo**

La stelon kiel stabilvaloran monunuon eblas uzi en diversaj sferoj. Ekzemple eldonisto de monata revuo ricevas abonojn. Li devas pagi la servojn de presisto koncerne paperon, kovertojn, afrankon, ktp. Rezulte de inflacio ĉiuj prezoj ja inklinas al plialtiĝo, kompreneble ne ĉiuj samtempe kaj ne ĉiuj rekte al la aktuala nivelo de inflacio. Do, neeviteble venas la tempo, kiam la eldonisto devas pensi pri plialtigo de la abonkotizoj. Ni povus montri, ke rilatigo de la nova

abonkotizo al la stelo konsiderinde plifaciligus la taskon, kvankam iuj komercaj konsideroj nepre meritus ankaŭ atenton.

Dua ekzemplo pri uzo de la stelo estas prenita rekte el la spertoj de esperantistoj de iu societo, kiuj ekzemple ludonas ĉambron al alia societo. Por la ludonado la Esperanto-societo ricevas lupagon. Se ĝi deziras daŭre ricevi la saman valoron (ja la aliaj kostoj por la societo konstante plialtiĝas sekve de inflacio), la metodo estus fari interkonsenton kun la luprenanta societo pri monata luprezko, esprimata en steloj, sed normale pagota en nacia valuto laŭ la valida kurzo de koncerna monato.

Verŝajne la plej valora uzebleco de stelo koncernas la ricevon de salajro kontraŭ laboro farita. Pro la inflacio la salajroj perdas sian valoron kaj oni devas plialtigi kaj akordigi ilin al la aktuala nivelo de prezoj. En multaj okazoj la diskutoj pri la plialtigo foje kondukas al vere akra disputo inter reprezentantoj de ambaŭ partioj – labordonantoj kaj laboruloj. Apliko de la stelo povus en multaj okazoj konsiderinde mildigi tiun problemon.

#### **Universala Ligo – fina periodo**

La uzeblecoj de stelo premisis internacian aplikon, kiu tamen neniam realiĝis. La Universala Ligo plu aktivis post la priskribitaj eventoj, sed ĝi ĝuis ĉiam malpli da atento en la Esperanto-movado. Pri la aktivado sur la kampo de mondfederalismo mi ne havas informojn, sed ties manko subtenas mian opinion, ke ankaŭ tie la Ligo vere malmulton faris.

En revuo Esperanto de UEA en la postaj jaroj daŭre aperis nekrologoj pri forpasintaj anoj de UL. D-ro Roelofs transprenis la redaktorecon de Bulteno de la Ligo, kiam siatempe Op 't Roodt sentis sin ne plu kapabla plenumi tiun taskon. La perdo de reguleco en la apero de tiu periodaĵo klare montris al la Esperantomovado, ke en la UL mankas aktivaj membroj.

En 1993 rezulte de decido de la estraro de Universala Ligo la eldonado de Bulteno ĉesis. Dum la sama jaro la kapitalo de la Ligo estis disponigita al fondaĵoj, ĉefe de Universala Esperanto-Asocio. Al la ĉi-lastata transiris ankaŭ la restanta stoko de la stelo-moneroj. Baldaŭ poste UEA komencis vendi ilin kiel ordinarnajn varojn pere de sia Libroservo.

Op 't Roodt forpasis en 1996, kaj d-ro Roelofs en 1998. Ambaŭ estis lastaj pioniroj el la vico de multaj laborantoj de Universala Ligo por monda paco kaj kunekzistado per iniciatoj, el kiuj la stelo okupis sendube gravan lokon.

Artikolo de **Lawrence Mee** el Monato Revuo  
Fonto: <http://www.monato.net/2005/008283.php>





### Tekrar merhaba,

Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı kitaptan kursumuza devam ediyoruz .

Derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın

çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Metin içindeki tirelerin (" - ") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanılıyor.

### LA ZOOLOGIA ĜARDENO

lun tago, kiam la musoj maten-manĝis. Sinjoro Muso diris: "Post la maten-manĝo, surmetu viajn ĉapelojn kaj vestojn. Ni iros al Londono.

La infanoj man-frapis. "Per vagonaro aŭ per aŭto?" demandis Johano.

"Per vagonaro," respondis la patra muso.

"Kien ni iros? Kien ni iors?" demandis Ŝila kaj Roĝero.

"Ni iros al la Zoologia Ĝardeno."

"Ho, bone, bone!" ekkriis Roĝero. "Ni vidis la leonojn kaj la leoninojn."

"Kaj la tigrojn kaj tigrinojn," diris Roĝero.

"Kaj la elefantojn," diris Roĝero.

"Kaj cent mil aliajn bestojn," diris Johano. "Ho, mi multe ŝatas viziti Zoologian Ĝardenon."

\* \* \*

La musoj atingis la staci-domon je la deka dudek kvin.

"Je kioma horo ek-iros la vagonaro al Londono?" demandis la patra muso al portisto.

"Je la dek-unua precize," respondis la portisto.

"Kie estas la biletejo?"

"Sur la kajo, numero unu."

Sinjoro Muso trovis la kajon, numero unu, kaj aĉetis la biletojn - de tria klaso, ĉar li ne estis tiel riĉa, kiel onklo Alberto; kaj baldaŭ ĉiuj musoj eniris la vagonaron.

Je dek kvin antaŭ la tagmezo ili atingis la Ĝardenon.

Ili vidis la leonojn la tigrojn, la kamelojn, la elefantojn, la vulpojn, la strigojn, la lupojn, la serpentojn, la simiojn, kaj multajn aliajn bestojn.

Ili tagmanĝis <sup>1</sup> en la Ĝardeno. Ili havis viandon, du legomojn (terpomojn kaj brasikojn), kaj finis per persikoj kaj kremo.

Tiam la patra muso alvokis kelneron. "Ho, kelnero! Kiom pagi?" demandis li.

"Nenin, nenion," respondis la kelnero. "La patro de la ĉef-kelnero estis muso, kaj li ĉiam donas sen-pagan manĝon al musoj."

"Tio ne estas kara," diris Sinjorino Muso. "Ne, tio estas tre malkara."

Sinjorino Muso donis grandan trink-monon al la kelnero.

"Ho, dankon, dankon," diris li, ridante.

Tiam la musoj reiris al la staci-domo, kaj revenis hejmen per rapida vagonaro.

Kiam ili atingis la hejmon, ĉiuj estis tre lacaj, sed tre ĝojaj.

"Ho, mi ŝatas viziti la Zoologian Ĝardenon," diris Johano.

<sup>1</sup> La musoj havas tri manĝojn ĉiu-tage; maten-manĝon, tag-manĝon, kaj vesper-manĝon.

Sözlük		kremo	krema	serpento	yılan
alvoki	çağırmaq, seslenmek	laca	yorgun	simio	maymun
atingi	ulaşmak	legomo	sebze	staci-domo	istasyon binası
biletejo	bilet yeri, gişe	leono	aslan	strigo	baykuş
brasiko	lahana	lupo	kurt	tag-manĝo	öğle yemeği
ekiri	yürümeye başlamak	man-frapi	el çırpmaq, alkışlamak	tagmezo	gün ortası
elefanto	fil	maten-manĝo	kahvaltı	tigro	kaplan
kajo	peron	nenio	hiç bir şey	trink-mono	içecek parası, bahşiş
kamelo	deve	pagi	ödemek	vesper-manĝo	akşam yemeği
kelnero	garson	persiko	erik	vulpo	tilki
kien	nereye?	portisto	taşıyıcı, hammal	zooligia ĝardeno	hayvanat bahçesi
kiom	ne kadar?	ŝati	beğenmek		
klaso	sınıf	sen-paga	bedava, ödemesiz		

<b>per</b>	"ile, aracılığı ile" edati
<b>je</b>	genel anlamlı bir edattır, diğer edatların yetersiz kaldığı durumda bu edat kullanılır (-de, -da, -e, -a gibi anlamları vardır). Özellikle saati göstermekte kullanılır.
<b>kie-n</b>	nereye? sorusu eğer geçişli bir fiile cevap ise o zaman akuzatif eki bu sözcüğün sonuna konur
<b>iri al Londono</b>	Londra'ya gitmek (al edati yön gösterdiğinden Londra kelimesi sonuna yön akuzatifi gelmez)
<b>iri Londonon</b>	bu formda al edati olmadığından Londra kelimesi sonuna yön göstermek için akuzatif konulur

## Komuna Legado okaze de Zamenhof aŭ Libro Tago

## propono de ILEI



### ESPERANTO KAJ DEMOKRATIO de VERDA MAJO

Pri « Verda Majo », Hasegawa Teru,  
japana aktivulino, bonvole legu en

[www.eo.wikipedia.org](http://www.eo.wikipedia.org).

Bonvole konsideru, ke ŝi skribis tiun tekston en la jaro 1943.

« **K**ion vidis en Cara Rusio la juna sentema Zamenhof? Avantaĝon de l'grandrusoj, subpremon al la aliaj nacioj, precipe la murdon de l'judoj, - kaj eble ankaŭ perfektan senrajtecon de l'popoloj inkluzive la grandrusan. Ĉu ĉi ĉio iel diferencas de l'agoj de l'germanaj kaj japanaj invadistoj? En la koro de Zamenhof flamis furio kontraŭ la despotoj, buĉistoj, aspiro al la paciĝo, familiiĝo de l'tuta homaro. Li kreis Esperanton dezirante ke ĝi utilu por la egaleco kaj sendependeco de ĉiuj nacioj grandaj aŭ malgrandaj, fortaj aŭ malfortaj.

Do, denaske kaj nature Esperanto estas demokrata, antifaŝista, kvankam tiutempe oni ankoraŭ ne uzis tian esprimon. Sed, supozu: kiel kurba ĝi fariĝus, se dum la kreskado ĝi ne laŭirus la vojon demokratan? Feliĉe, la saĝa kaj amoplana Zamenhof

tre frue deklaris, ke li nur estas ĝia kreinto, li havas nenian rajton nek privilegion por ĝi, ĝi apartenas al la popolo ĝin uzanta, kaj ĝi evoluu inter ili.

Jes, Esperanto ne estas propraĵo de Zamenhof, sed de l'publiko. Oni ne bezonas nek devas blinde obei kaj alteniĝi al la vortaro kaj stilo. Esperanto ne estas rusa nek angla nek eŭropa, ĝi estas internacia. Tial ankaŭ ni orientaj esperantistoj havas rajton kaj devon aktive antaŭenpuŝi la movadon. Kaj efektive ni tion faris kaj estas farantaj. (...)

Esperanto estas tutece demokrata. Do la Hitleranoj konsekvence malamikas al ĝi. Post ilia pereco, nome post finiĝo de tiu ĉi milito la demokrata Esperanto en la demokrata mondo trovos sian bonan grundon kaj kreskos pli rapide kaj riĉe. Por tio tamen necesas nia konstanta pli pena laboro, ĉar neniuj venkoj mem venas al ni. »

(El Lernilo de Esperanto n-ro 11-12; nov.-dec., 1943)  
El la libro « Verkoj de Verda Majo » Ĉina Esperanto-  
Eldonejo, 1982



## Klasika fromaĝkuko el soj-jogurto, biskvitoj kaj marmelado el framboj - Veganarto

**S**aluton amikoj, post iom da ripozado mi revenas kun ĉi bongustega kaj tre facila kuko. Temas pri la klasika fromaĝkuko kun marmelado en la supro. Ĝin ni povas tre rapide fari kvankam eble kelkajn ingrediencojn oni devus trovi en specialaj lokoj kiaj agaragararo (vegetaĵa alg-devena gelateno). Mi rekomendas ĝin ankaŭ okaze de datrevenoj :)

### Ingrediencoj:

- 12 biskvitoj (Maria-stilaj biskvitoj)
- 50 gr da centprocenta vegetaĵa margarino
- 3 etaj jogurtoj el sojo aŭ 150 gr.
- 1 taso da vegetaĵa lakto
- 1 kulero da agaragararo pulvorigita.
- 3 supkuleroj da citronosuko
- Marmelado el framboj aŭ fragoj.

### Paŝoj:

Unue ni devas krei la bazon de nia fromaĝkuko. Por tio varmigu la margarinaron kaj pulvorigu bone la biskvitojn. Miksu ambaŭ kaj kirlu ĝis plena sameciĝo. Disfaldigu ĝin en la bazo de ronda muldilo (mi uzis 22centimetran muldilon).

Sekve varmigu la tason da vegetaĵa lakto kun la kulero da agaragararo kaj lasu surfajre ĝis ekbolo. Dume movetu ĝin konstante. Elfajrigu, aldonu la



jogurton kaj la citronosukon, movu bone kaj metu en la muldilon.

Lasu ĝin malvarmiĝi kaj la miksaĵo el lakto kaj jogurto malmoliĝos pli malpli post 30 minutoj. Prenu la marmeladon, movu ĝin energie kaj per ilo (ĉu spatelo, ĉu kulero) kovru la supron de nia fromaĝkuko kaj lasu ĝin malvarmiĝi iom pli.

Kaj jen ĉio! Nia kuko estas preta! Bonan apetiton!

Fonto: <http://veganarto.net/klasika-fromagkuko-el-soj-jogurto-biskvitoj-kaj-marmelado-el-framboj/>



## “HRISTO GOROV – HRIMA”

### INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por **rakonto kaj eseo**.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkita en Esperanto.

La rakontoj kaj la eseoj estu ĝis 4-paĝaj, komputile kompostitaj.

La konkurso ne havas apartan temon.

**La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.**

**Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2018 al adreso: e-mail:**

**modest@abv.bg aŭ per la poŝto al adreso:**

**Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, “Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.**



### Solvo de la krucvort-enigmo

1	L	E	N	I	N	G	R	A	R	D	O	
2	A	B	E	A	T	O		A	R		B	
3	O	L	E	U	I	C	A	N	N	E	S	
4	N	E	G		I	A	N	D	O		E	
5	D				E		I	O		A	D	
6	O	T	A	N	O	M		A	N	O		
7		R	I	Z		O	I	R	T			
8	O	O	L	I	T		R					
9	K	P		M	A	R	A	T	O	N		
10	R	I	K		R	O	T	A	C	I		
11	A	K	O	R		M	O	R	E	N		
12	P	A	R	A	B	O	L	O		A		